

N o b l a v i r o n e p l u v i v a s .

Antonín Zápotocký, prezidento de Ĉeĥoslovaka respubliko mortis la 13-an de novembro 1957. La trista fakto tre doloras, ĉar la dua laborista prezidento enskribiĝis kun amo en korojn ne nur de siaj homoj, sed vaste en la mondo.

Ankaŭ ni, esperantistoj, bone kaj alte taksis progresemajn ideojn kaj porpacan klopodon de la mortinto. Unu el unuaj en nia respubliko – en funkcio de ministroprezidanto kaj sindikata ĉefo – li konsente subskribis la alvokon pri la Internacia Lingvo por UNO.

Nian doloron pro la forpaso de kamarado Antonín Zápotocký ni esprimis per letera kondolenco al lia edzino, al la Centra Komitato de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio kaj al la registaro de la respubliko.

Memoro pri Li daŭre restu en koroj de ĉiuj pacemaj homoj!

Al ĉiuj eksterlandaj geamikoj, kiuj esprimis al ni siajn kunsentojn, ni sincere dankas!

- - -

Al la novelektita prezidento de Ĉeĥoslovaka respubliko
kamarado Antonín N o v o t n ý

en Praha.

Estimata kamarado Antonín Novotný,
permesu, ke ni en nomo de membraro de la Klubo Esperantista en Praha Vin plej kore gratulu okaze de Via elekto de prezidento de Ĉeĥoslovaka respubliko.

Via personeco kaj la ĝisnuna laboro estas por ni vera garantio, ke Vi gvidos nian ŝtaton sur vojo indikita jam de viaj antaŭuloj, neforgeseblaj Klement Gottwald kaj Antonín Zápotocký, al finkonstruo de socialismo en nia lando.

Ĉe tiu okazo ni promesas al Vi nian kunlaboron ne nur en niaj laborejoj, sed ankaŭ en niaj vicoj. Kiel esperantistoj helpe de la Internacia lingvo Esperanto ni daŭrios niajn klopodojn por plifortigo de amikeco kun popoloj de tutmondo, ni instruos ilin pri ekonomiaj kaj kulturaj sukcesoj de nia ŝtato, prezentos al ili la plej belajn florojn de niaj literaturo kaj arto kaj lakros por firmigo de tutmonda paco!

Subskribita

Jaroslav Šustr, prezidanto

(Traduko de la letero, kiu en ĉeĥa lingvo estis la 22-an de novembro 1957 sendita al la prezidento de nia ŝtato.)

Praha-ek-1958-50-02

BULTENO PRAHA 50 1958

- 02 -

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha 2, Ve Smečkách 26 je la 20-a horo.
De la 19-a horo perfektiga kurso gvidata de A. Slanina.

JUNULARO krome kunvenas ĉiumarde en Praha 2, Krakovská 21/IIIa etaĝo je la 19-a horo.

K U L T U R P L A N O de Esperantista Klubo ĉe OB ONV2 en Praha
por la I-a duonjaro 1958.

Devizo: „Februara venko de la laborista klaso garantias kontentodonan vivo de laboruloj en popoldemokratia Ĉeĥoslovakio.“

Januaro:

8. Prezento de la kulturplano al la membraro.

15. Lektoro Ilja Severa

22. Lektoro Štěpán Urban

29. Pordiskuta tribuno.

Februaro:

5. Lektoro Anĉi Bárochová

12. Lektoro Jaroslav Mařík

19. Lektoro Dolfá Bartošík

26. Pordiskuta tribuno.

Marto:

5. Lektoro Ladislav Kynčl

12. Lektoro Rudolf Hromada

19. Lektoro Vlastimil Novobilský

26. Pordiskuta tribuno.

Aprilo:

2. Lektoro Eva Řiháčková

9. Lektoro Josef Vítek

16. Lektoro Vuk Echtner

23. Lektoro Juliana Bendová

30. Pordiskuta tribuno.

Majo:

7. Lektoro D-ro Augustin Pitlík

14. Lektoro Jiřina Holá

21. Lektoro D-ro Tomáš Pumpr

28. Pordiskuta tribuno.

Junio:

4. Lektoro Antonín Slanina

11. Lektoro Jožka Staněk

18. Lektoro František Pytloun

25. Pordiskuta tribuno.

Klubvesperoj krom la prelegoj de meciitaj lektoroj enhavas:

1. politikaj aktualaĵoj
2. informoj pri grava korespondo veninta kaj forsendita
3. gramatikaj kaj lingvostudaj kontribuoj
4. salutoj de eksterĉefurbaj kaj eksterlandaj gastoj.

En Praha la 27-an de decembro 1957.

--

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

Naskiĝo: Al niaj fervoraj klubanoj familio Jiří kaj Marta KŘENEK naskiĝis la 6-an de oktobro 1957 filineto Jitka, kiun la feliĉaj gepatroj tuj klubanigis. Ni partoprenas ilian ĝojon kaj al plej juna nia membro ni sincere deziras kontentan viviron!

--

Al niaj fidelaj legantoj Svetlana kaj Eugen NIKITIN en Moldavia urbo Kiŝinev, Sovetunio, naskiĝis filo Sergej. Sinceran gratulon!

--

Geedziĝo: s-anino Eliška BOHMOVÁ, nia membrino en Teplice kaj Erich Schreiber geedziĝis la 2-an de novembro. Ni sincere ĝojas kaj gratulas!

--

Jubileo: BRILANTA EKZEMPLO DE SENLACA LABORO – 50 JAROJ DE PORESPERANTA AGADO de JULIE ŠUPICHOVÁ. En la jaro 1957, nia alte estimata samideanino Julie Šupichová ĝisvivis jubileon kiun oni ne rajtas preterpasi kaj pri kiu la ĉeĥoslovaka kaj tutmonda esperantistaro devas fieri: ŝi atingis 50 jarojn de sia pionira aktiveco sur la kampo de la Lingvo Internacia.

Praha-ek-1958-50-03

BULTENO PRAHA 50-1958

- 03 -

Julie Šupichová naskiĝis 27. 1. 1884 en Studnice apud Náchod. En 1907 ŝi fariĝis instruistino kaj en la sama jaro ŝi ellernis Esperanton. Tiu ĉi jaro estas sendube tre grava en ŝia vivo: ŝi fordonis sin al fervora senlaca laborado por helpi la interproksimiĝon de la popoloj per Esperanto. Duonjarcento pasis nun de tiu momento, ĝi grizigis ŝiajn harojn, subfosis ŝian sanon, sed ĝi ne sukcesis rompi ŝian spiriton kaj ĉesigi la laboron por la amata ideo. Estis antaŭ nelonge ke ni legis en la „Bulteno“ pri ŝia nova faro: eldono de Esperanta legolibro, per kiu ŝi volas mildigi la ekzistantan mankon de tia literaturo en nia lando.

Estu longa vico por elnombri ĉiujn farojn de la jubileantino sur la kampo Esperanta. Ni menciuj kelkajn: en 1909 ŝi aranĝis en Ĉerv. Kostelec ekspozicion pri Esperanto kaj fondis tie „Esperantan Unuiĝon“, en 1910 ŝi fariĝis sekretario de la „Unua sinjorina ĉeĥa societo Esperanta“ kaj komitatano de Bohema Asocio Esperantista; post la unua mondmilito ŝi gvidis en Praha „Rondeton de Esperantistinoj“; en 1921 ŝi estis unu el la sekretarioj de la XIII-a Universala Kongreso de E. en Praha, en 1922 ŝi prelegis en internacia konferenco de esp. instruistoj en Ĝenevo. Ŝi estis sekretario de la Ĉeĥosl. Esp. Instituto, fondis „Liberan unuiĝon de junaj esperantistinoj“, en 1928 „Liberan Unuiĝon de Esperanto-Amikaro“. Ŝi estis delegito de UEA de 1910, membro de la Lingva Komitato, membro de Kuratoraro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

Tre riĉa estas la literatura aktiveco de J. Šupichová. Ŝi kunlaboris al sesdek ĉeĥaj kaj Esperantaj gazetoj. Plej konataj estas ŝiaj kursoj de Esperanto en gazetoj (ekz. en „Malý čtenář“). Ŝi eldonadis dum tri jaroj „Esperantský zpravodaj“. El dudeko da ŝiaj libroj la plej gravaj estas „Esperanto, jeha vývoj a význam pro národní školu“, „Lernolibro de Esperanto“ (ĉeĥa en 5 eldonoj) kaj „Kdo je Zamenhof?“. Pluraj verkoj restas ankoraŭ en manuskriptoj. Gravan kontribuon al la klerigo kaj al la propagando por Esperanto ŝi faris ankaŭ per sia vasta aktiveco prelega, precipe per la radio.

Rekonante la meritojn de Ŝupichová la Universala Esperanto-Asocio, la estinta Esperanto-Asocio en ĈSR kaj aliaj societoj nomis ŝin honora membrino.

Malgraŭ la benita aĝo, la longdaŭra malsano, kiu preskaŭ malpermesas al ŝi moviĝi kaj eliri el la loĝejo, nia veteranino ĉiam vigle interesiĝas pri ĉio nova en Esperantujo kaj ... ĉiam ankoraŭ laboras.

Ni danku ankaŭ al s-anino Hejná, kiu per zorga flegado al sia amikino ebligas al ŝi resti ĉiam aktiva.

Julie Ŝupichová, la modesta virino kun ora koro, estas fenomeno de ekzemplodona, formika laborado por Esperanto kaj por la paco en la mondo. Tian laboron, kian ŝi plenumis, oni distingas en oficialaj medioj per titoloj, laŭroj kaj oraj medaloj. Ni ankoraŭ ne havas la eblecon plenumi nian devon reale. Ni do atribuu almenaŭ simbole la **o r a n m e d a l o n** al Julie Ŝupichová kiel rekonon de meritoj kaj reale ni transdonu al ŝi ruĝajn rozojn kiel esprimon de nia amo kaj dankemo.

J. M.

(Postnoto: La Esperantista Klubo en Praha transdonis al s-anino J. Ŝupichová en la nomo de la ĉeĥoslovaka esperantistaro, gratulan leteron kaj ruĝajn rozojn.)

- - -

La 21-an de decembro 1957 ankaŭ ni afranca pioniro Intendantato generalo **B A S T I E N** el Parizo festas sian 88-jariĝon. En la pasinta januaro li skribis al ni i. a. En tiu ĉi malkvieta epoko viaj senlacaj klopodoj favore al nia internacia lingvo alportu efikan helpon por repacigo de la popoloj! ... Nia kara samideano Bastien akceptu niajn vere sincerajn gratulojn kaj salutojn!

--

Morto:

Theodor ĈEJK A mortis. La 26 Novembro 1957 – kelkajn semajnojn antaŭ la pleniĝo de liaj 80 jaroj – forpasis Theodor R. Ĉejka, la iniciativo de la E-movado inter la ĉeĥoj. Li naskiĝis la 10 Januaro 1878 en Bystřice pod Hostýnem kaj en tiu moravia urbeto li restis la tutan vivon – escepte la tempon de sia studado lerneja. Fariĝinte tie instruisto li jam en 1900 eldonis proprariske esp. lernolibron, sufiĉe ampleksan, kun ambaŭ vortaretoj (188 p.). Sekvis nova lernolibro, reverkita, kiu atingis kvin eldonojn. Tre efika el propaganda vidpunkto estis lia malgranda lernolibreto (adaptita laŭ franca).

En 1908 Ĉejka eldonas (kun Krumpholc) bonegan vortaron esp.-ĉeĥan (170 p.). Laŭ la tipografia perfekteco tiu vortaro ĝis nun ne estis superita de iu ajn esp. vortaro en nia lando.

Ĉejka estis eldonanto de Revuo Internacia (1902) mirige altnivela inter la tiamaj esp. frazetoj, plie de propagandaj gazetoj Bohema Esperantisto kaj Germana Esperantisto. En 1907 li estis unu el 5 ĉeĥoj partoprenintaj la Universalan Kongreson en Cambridge. En 1910 li komencis eldoni Internacian Pedagogian Revuon, sed devis ĉesi pro malmulteco de la abonantoj (kaj ankaŭ kunlaborantoj).

Persone li estis homo modesta kaj afabla, treege dirigenta. Ni estis agrable surprizitaj, kiam en 1947 li aperis en Praha, svelta blankbarbulo, vigla kvankam preskaŭ sepdek-jarulo. En 1950 li parolis en la Tutŝtata Kongreso en Brno. Malsaneta kaj poste malsana en la lastaj jaroj, li kun intereso sekvis la movadon, ĉiam ĝojante, kiam iu vizitis lin en lia domo apud arbaroj montaraj super la urbeto Bystřice p. H.

La memoro de tiu ĉi vere nobla viro restos por ĉiam en la historio de la Esperanto-movado.

R. H.

--

Karel PROCHÁZKA, membro de Esperantista KLubo en Praha, mortis la 21-an de novembro 1957 atinginte 77 jarojn de sia vivo. Pionira epoko de nia movado en la komenco de ĉi tiu jarcento estis tempo de florado de aktiveco de Karel Procházka. Kelkobla esperantista komitatano, kunlaboranto de esperantistaj gazetoj, verkisto, historiisto, membro de Ekzamena komisiono, organizanto kaj propagandisto estis la ĉefaj trajtoj de liaj aktivech. Ĉeĥa-esperanta vortaro, kiun li verkis kun sia amiko Ed. Kúhnl kaj kiu dum kelkaj jardekoj plenumadis sian taskon, estis tiutempe plej granda kaj restos por ĉiam unu el la juveloj de nia laboro. Procházka verkis historion de Esperantista Klubo en Praha pri ĝiaj 20 jaroj. Romano de Božena Němcová „Avinjo“, kiun li tradukis kun Vl. Tobek aperis antaŭ la unua mondmilito kaj apartenas al tre valoraj floro jen nia literaturo. En lastaj jaroj samideano Procházka esis daŭre malsana. Dum kelkaj jaroj kun timo ni observis, kiel lia tuta korpo malgrasiĝis, kaj seklas. Sed lia spirito estis ĉiam aktiva, ĉiam liaj paroloj kaj respondoj tre saĝaj kaj viglaj. Ĝis lasta tago de sia vivo restis Karel Procházka fidela al niaj lingvo kaj movado, al kiuj li dediĉis longajn jarojn de sia vivo.

La 26-an de novembro 1957 akompanis lin sur lasta lia vojo lia edzino, aro da geparencoj, amikoj kaj kelkaj esperantistoj. En la nomo de Esperantista Klubo en Praha kaj ĉeĥoslovaka esperantistaro adiaŭis ĉi tiun eminentan pioniron esperanta prezidanto de Esperantista Klubo en Praha.

J. Š.

--

Nur hodiaŭ ni eksciis, ke la 6-an de majo 1957 mortis nia kara kunbatalanto k-do František STŘÍBRSKÝ en Kladno. K-do Stříbrský lernis Esperanton antaŭ 10 jaroj pere de k-do Burda en sanatorio Na Pleši por TBC-malsanuloj. Kiel sonanto de L. P. kaj pli poste de nia Bulteno li vigle laboris per Esperanto por la mondpaco. La ĉeĥoslovakaj esperantistoj lin ĉiam memoros.

En Hradec Kráové mortis en sia 68-a jaraĝo konata esperantisto, dentkuracisto MUD-ro Alfred WEINER (la 23-a de septembro 1957). Lokaj esperantistoj perdas en li fidelan kunlaboranton. Lia familio akceptu nian profundan kunsenton!

--

En Moskvo dum aŭtomobila katastrofo mortis s-anino Zorja DANOVSKAJA, 27-jara filino de konata esperantisto kaj nia kunlaboranto N. F. Danovskij. Li akceptu nian kondolencon!

--

La 3-an de decembro mortis membro de nia klubo s-ano Karel KNEIFEL. Cindrigo okazis la 9-an de decembro en Praha-Strašnice. Nur tagmeze tiun tagon ni sciigis la forpaso de tiu malnova nia membro. Al nia membrino s-anino Božena Kneiflová kaj al ĉiuj geparencoj nian sinceran kondolencon!

Dum lastaj monatoj perpoŝtaj salutoj el proksimo kaj malproksimo estas eksterordinare tre multaj. Kortuŝigaj estas diversaj donacoj de niaj legantoj, kiuj tiel bele esprimas sian volon pri repago. Nia legantara familio ĉiam pligrandiĝas. Ni pro tio sincere ĝojas. Koran dankon pro ĉiuj salutoj okaze de Kristnasko kaj jarŝanĝo. Tutkore ni reciprokas ilin!

-

Voĉoj de niaj legantoj:

Dro E. Bokarev, Enfr. Malmgren kaj Inĝ. Gustav Nilsson sendis al ni komunan saluton el Stokholmo okaze de traveturo de Dro Bokarev al Oslo.

J. Régulo Pérez el La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj: „La Bulteno estas ĉiam minejo de gravaj informoj... Vi meritas kaj akiris la admiro de la tuta Esperantujo, pro via klera presistemo kaj sindona agado... Samdate mi sendas al vi la lastan STAFETO-libron, nome JOZEFO...

W. AULD, redaktoro de Esperanto: ... Ĉiam mi legas la enhavon de Bulteno de unua ĝis la lasta litero...

F-ino Blanche CLAVIER el Francujo: Mi dankas al la klubo pro la sendo de la Bulteno, kiu montras al ni la vojon, kiun oni devas sekvi por atingi sukcesojn. Speciale la lastaj numeroj dokumentis vastan laboron. Kun speciala intereso mi legis pri la UK en Marseille.

Esperantista grupo „LA STELO“ en Ĝenevo: Ni ĉiam legas kaj rondirigas en nia grupo kaj inter konatuloj vian Bultenon, kiun ni ricevas regule el Praha. Ni estas kortuŝitaj pro via amika gesto... Koran rememoron de prof. EDMOND PRIVAT al ĉiuj ĉeĥoslovakaj gesamideanoj... (subskr. P. Bouvier).

-

EL LA LETERO DE NIA MALPROKSIMA MEMBRINO MARIE GINZOVÁ:
(daŭrigo)

Estas multaj aferoj, pri kiuj indus rakonti. Mi provos diri al vi iom pri izraela fervojo. Oni devas veni ĝustatempe, ĉar kelkajn minutojn antaŭ foriro de la vagonaro oni fermas ĉiujn enirejojn por ke ne okazu malfeliĉo. Matene eksonas el laŭtparoliloj voĉo de la staciestro: „Bonan matenon, gesinjoroj! Nun alproksimiĝas la unua vagonaro, veturonta al Tel-Aviv kaj Jeruzalemo. Mi petas vin en via intereso kaj en intereso de via familio: Ne alproksimiĝu al ĝi antaŭ ol ĝi haltos.“ Tiun averton li ripetas kelkfoje kaj li invitas ĝentile, kiam oni povas eniri en vagonojn. Kaj antaŭ ol la vagonaro moviĝas, li deziras agrablan vojaĝon al ĉiuj pasaĝeroj. Oni ofte rimarkas, ke oficialaj instancoj turnas sin al la civitanoj ne kiel oficoj, sed iel persone. Estas agrable tiamaniere rilati kun homoj.

Ni kompreneble jam ĉesis bani nin (en decembro, rim. de la red.), sed ni estis unuj el la plej persistaj. La garda turo estas nun forlasita sur la bordo, oni ne plu hisas tie flagon blankan, ruĝan aŭ nigran, por montri ĉu estas la maro trankvila, iom onda aŭ danĝera. En ĉiu sezono okazas malgraŭ ĉiu singardo malfeliĉoj.

Nun tie promenas grandaj maraj araneoj, iuj kiel grandaj manplatoj kaj abomenaj por rigardo. Vespere kaj ĉefe en nokta trandilo ni aŭdas la ondobruon, kiu fariĝis nia lulila kanto. Kaj en nian fenestron daŭre palpebrumas la lumturo de Haifa.

Neniam mi povus kredi kiel bela povas esti ĉi tiea firmamento. Ĝi ŝajnas esti neutime alta, ĝi estas klara kaj brilas, ofte ĝi estas azure blua kaj senmakula, iam surestas nuboj en fantaziaj formoj kaj koloroj tute nekutimaj, iam ravas la ĉielo per delikataj koloroj paŝtelaj en ĉiuj nuancoj. Iam ĉe la sunleviĝo matene aperas antaŭ niaj fenestroj arbusto kvazaŭ en flamoj kaj mi komprenas la ekeston de tiu biblia rakonto. Al tio aldonu la regionon, en kiu ni ĉi tie vivas. De tri flanko jen malkproksimo nin ĉirkaŭas seninterrompa girlando de montoj, kiuj fermas nian larĝan horizonton, antaŭ ni estas la maro. Kaj ni havas mirindan rigardon je ĉiuj flankoj. Ĝus hodiaŭ apogis sin post abunda pluvo la suno al la montaro kuŝanta norde kaj nordokcidente de ni. La radioj montris al ni detalojn ĝis nun ne konatajn, deklivojn kaj nemultajn valojn de la preskaŭ seninterrompa montĉeno, ĉar la montoj ne estas tre altaj, ili estas neniel timigaj, sed vekas nur admiron. La suda valo de la montaro kun monto Karmel ĉe la fino najbaras la maron kaj fermas la golfon de Haifa kaj ĉe ĝia ekstremo kuŝas la urbo Haifa mem. El proksimo oni vidas maron de belaj plejparte ŝtonaj domoj, inter ili imponajn modernegajn betonajn konstruaĵojn. Granda parto de la urbo situl sur monto super la golfo. La stratoj estas konstruitaj inter rokoj laŭ plej sagaca maniero, plaĉaj vilaoj kaj artisme kreitaj loĝdomoj estas ĉirkaŭitaj de ĝardenoj kun multaj palmoj kaj aliaj, ĝenerale ne konataj arboj. La komerca kvartalo kun belaj vivaj stratoj, kun granda trafiko, estas malsupre ĉirkaŭ la haveno kaj iom super ĝi Mi volonte promenuj kun vi en ĉefstrato Herzl kaj vi neniam ĝin forgesus. Aŭ vi duu la rigardon de la monto Karmel al la urbo sub vi kaj al la haveno kun blua maro kaj sur ĝi manovrantaj ŝipoj. De malproksimo estas la urbo kiel brila diademo kaj ni kiel en giganta kaj grandioza amfiteatro. Sur norda ekstremo ni vidas, iom neklare, la urbon Akko kun iaj altaj turoj, sude Haifa. Vespera rigardo al Haifa, kiam ĝi dronas en elektra lumo kun longaj alikoloraj strioj estas nepriskribebla kaj oni sentas sin kiel en iu el la fabeloj de Mil kaj unu noktoj...

- - -

La artikolo: MI ESTIS EN MARSEJLO...

ne estus bone finita, se mankus en ĝi la jenaj, nepre konsiderindaj konstatoj. La tuta merito pri la ebleco de ĉeĥoslovaka partopreno apartenas al la Ĉeĥoslovaka Ligo de Invalidoj, kiu en sia blindua fako vaste uzas Esperanton. Ĝia sukceso en la klopodo venigi, post multaj jaroj, sian reprezentanton al la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, eble estas krono de ĝia ĝisnuna rimarkinda kaj laŭdinda agado por- kaj per-esperanta.

En la lastaj jaroj, strange, preskaŭ malaperis (el gazetraportoj, jarlibroj k. s.) mencioj de faktoj pri la aktiveco de niaj blindaj samideanoj, kaj, bedaŭrinde, ili ne trovis sufiĉe varman lokon eĉ en la mensoj kaj koroj de iliaj vidantaj kunbatalantoj. Kaj tamen ili faras bonan laboron sur la komuna batalkampo. Ili demandas sin mem, kiel povis malaperi el la jarlibro de UEA la mencio de „Esperanta Ligilo“, eble la plej malnova nun aperanta Esperantorevuo (ĝi aperas de la jaro 1904, fondita de prof. Th. Cart), aŭ la nomo de la internacia blindulorganizaĵo Esperantista, funkanta tiel bone, ke ĝi havas siajn ĉiujarajn kongresojn. La nova jarlibro de UEA iom riparos la mankon, enmetinte indikojn pri ambaŭ organoj, sed mankas kompleteco, ĉar ekzistas ankoraŭ aliaj internaciaj aŭ naciaj Esperantorevuo kaj organizaĵoj atentindaj, ekzemple ankaŭ „Aŭroro“, la organo de la ĉs. blindaj Esperantistoj, honorinda ne nur por sia aĝo (ĝi estas fondita en 1920), sed pro sia regula seninterrompa nerado.

Sed kies merito estas „Aŭroro“, ĝia daŭro kaj ĝia evoluo al multipaĝa revuo, ĝia regula eldonado pli ofta lastatempe? Esta la Ĉs. Ligo de Invalidoj, kiu decidis pri tio. Ĝia blindula fako dissendis en 1955 Esperanta cirkuleron tra la tuta mondo, ke ĝi – kiel jubilean donacon okaze de la dekjara datreveno de liberiĝo de Ĉeĥoslovakio – sendados senpage Aŭroron al ĉiu alilanda blindulo.

En ĝia ĉeĥlingva blindula revuo „Zora“ estas konstanta propaganda rubriko pri Esperanto. De tempo al tempo ĝi eldonas imponajn Esp. publikaĵojn por blinduloj. Tiujn ĉi laborojn la Ligo bone pagas. Ĝi kun speciala favoro akceptas alilandajn delegitojn kaj gastojn, kiuj uzas Esperanton. Se estus bonvolaj gvidantoj, ĝi tre volonte organizus kurson por siaj membroj, organizus interesrondeton. Ĉu ĝi ne meritas tiun ĉi nian helpon kiel dankon por tio, ke ĝi ĉiufoje klopodis realit, ke post multaj jaroj povu veni ĉs. reprezentantoj al la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, kaj ke ĝi per tio helpis, ke ankaŭ ĉe la Universala Esperanto-Kongreso 1957 aperu nia delegito?

La adreso por sendi dankesprimojn por la bona Esperanto-laboro, laŭdojn kaj sugestojn, proponojn de kunlaboro ktp., estas: Svaz ĉs. invalidů, Cyrillometodějské n. Praha 3, Ĉeĥoslovakio.

Vuk Echter

--

KION VIDIS LA KONGRESANOJ EN MARSEJLO.

Kiel ofte okazas en grandurboj, antikva konstruaĵo ĝenas la trafikon aŭ novan domvicon, kaj oni decidas forigi ĝin. Multaj urboj perdis tiel plej valorajn kaj neniel anstataŭeblajn memoraĵojn, kiuj dum jarcentoj estis konsiderataj neforigeblaj partoj de la urbobildo. Kiam ekzistas sufiĉe da volo kaj da lerteco, oni povas savi tiajn domojn. Neniu el ambaŭ ecoj mankis en Marsejlo, kiam antaŭ du jaroj dum plilarĝigo de ĉefstrato la urbestro decidis forŝovi domon, kiu staris tie ekde la jaro 1535. Oni subfosis ĝin, ŝtopis ĉiujn fenestrojn kaj pordojn, ĉirkaŭbrakis ĝin per feraj ringoj, surmetis sur radojn kaj laŭ rapido de 12 cm en minuto oni movis la honorindan maljunulon pezantan 700 000 kg, al ĝia nova loko en distanco de 20 m. Survoje oni turnis ĝin je 90 gradoj. La domo ŝanĝis sian starpunkton en kompleta ordo kaj la preterirantoj nenion rekonas pri ĝia nekutima sorto.

El hebrea „Haarec Ŝelanu“ tradukis O. G.

NI RECENZAS, KOMENTAS, LEGIS POR VI ...

SOLEMAN VESPERON memore de la 40-jara datreveno de la Granda Oktobra Revolucio okazigis la 9-an de Novembro 1957 la Esperantista Klubo en Praha. La salono de la Malgranda Scenejo estis plena de gesamideanoj kaj ankaŭ de multaj neesperantistoj-sume ĉirkaŭ 200 homoj-kiuj atente sekvis la artan esperantlingvan kaj muzikan programon. Unue parolis profesoro Kilian pri siaj travivaĵoj el la tagoj de la Revolucio en Siberio kaj demonstris la neimageble grandan vojon, kiun postlasis la popolo de la tiamaj simpluloj, atinginte ĝisnun la plej altajn kulminojn de la science kaj socia progreso. En la arta parto de la programo ni aŭdis el la buŝo de s-anino Eva Seemannová kortuŝe recititan leteron de Tatjana al Onegin kaj la finan monologon de Tatjana. Zdenka Hrnčířová, operkantistino de la Nacia Teatro, prezentis du kantojn de Ĉajkovskij. Eva Seemannová, Antoni Seemann kaj Vl. Novobilský enscenigis emociigajn partojn de la fama dramo de Karel Čapek „La patrino“. Blanka Ŝaarová pianludis komponaĵojn de Ĉaĉaturjan jak Smetana; D-ro Prvoslav Sádlo-Páv prezentis per violonĉelo la rokoko-variaĵojn de Ĉajkovskij, akompanate per la pianludo de V. Čanová.

La ĉeestantoj forportis kun si el la sukcesplena vespero riĉajn impresoj.

-

ESPERANTA SEMINARIO EN PRAHA. La Junularo de la Esperantista Klubo en Praha aranĝis 26. – 29. 11. serion de ĉiutagaj prelegoj (seminarion), kiun finis sabate 30. 11. Amuza vespero kun artisma programo, tombolo kaj danco en la palaco Fénix. Por la tombolo venis eĉ donacoj el Svedlando (G. Nilsson) kaj el Nederlando. En la artisma programo oni ĝuis la drameton „Korespondu“ de A. Seemann (geedzoj Seemann, E. Řiháčková, Dro P. Sádlo), skeĉon el „La modo regas la jarcentojn“ (membroj de Malá scéna) kaj kantojn de la ensemblo „Kvítko“. Ĉeestis ĉ. 200 personoj, plejparte junularanoj, el 30 lokoj de ĉiuj landpartoj; de malproksime venis s-ano A. Zachariáš el Košice, ne domaĝinte pasigi 1400 km en la vagonaro.

Tiu ĉi decembra amuzvespero en Praha okazas jam plurajn jarojn kaj videble ĝi havas bonan tradicion.

La sekvintan dimanĉon la partoprenantoj aranĝis kelkhoran renkontiĝon, diskutante pri la problemoj de la ĝenerala kaj junulara Esp. movadoj. I. a. partoprenis ankaŭ la eksprezidanto de TKKE J. Vitek kaj la prezidanto de MEM R. Burda.

jm.

JULIE ŠUPICHOVÁ: NI LEGAS KAJ LERNAS. Legolibreto por komencantoj kun metita el la verkaro de D-ro L. L. Zamenhof. Sub aprobo de la Lingva komision de la Jugoslavia Esperanto-Federacio eldonis 1957 Kroatia Esperanto-servo en Zagreb 1957. Formato 14 cm x 19,5 cm, 40 paĝoj, bona papero, klara preso, 1000 ekzempleroj. – Helpilo, kiu jam delonge mankis al kursgvidantoj kaj kursanoj, memstudantoj, al homoj, kiuj intencas perfektiv en la lingvo en plej bona senco. Vortoj el verkoj de nia Majstro parolas al la leganto el modelaj frazoj, proverboj, anegdotoj, diversa legaĵo, tradukoj el verkaro de H. C. Andersen, J. W. Goethe, Shakespeare, el Lingvaj respondoj kaj el vortoj de Zamenhof. La du lastaj ĉapitroj enhavas La Esperon kaj liston pri verkaro de Zamenhof laŭ vidpunktoj instrua kaj literatura. Ni gratulas al la aŭtorino, ni dankas la eldonanton!

-jelĉ-

MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO kolektas subskribojn de ĉeĥoslovakaj civitanoj, kiuj alias al la apelo de la Albert Schweitzer-komitato kontraŭ atombomboj. En nia lando certe ne estos Esperantisto, kiu en sia ĉirkaŭaĵo rifuzus kunlaboron en tiu ĉi kampanjo. Jam nun alvenis kelkdek miloj da subskribuj. Deziru rektajn informojn ĉe la prezidanto de MEM Rud. Burda, Palackého nám. 6, Plzeň, Ĉeĥoslovakio.

-

LA KOMPLETA VERKO DE BAUDELAIRE sub la titolo LA FLOROJ DE L' MALBONO aperis en Esperanto. Eldonis ĝin kiel duoblan volumon (8-9) de sia belliteratura serio la eldonejo Stafeto. Tiu ĉi tute eksterordinara verko, de granda signifo kaj valoro, viciĝas al la plej gravaj eventoj de nia literaturo. Ĝi enhavas 400 paĝojn kaj estiĝis per kunlaboro de plej eminentaj Esperantaj poetoj sub la redakto de Kalocsay kaj Waringhien, La Traduko estis preta jam en la jaro 1937, sed pro malfavoro de la tempo ĝi aperis nur post du jardekoj. Intertempe ĝi maturiĝis ankaŭ forme per intensa revizia laboro. Ni gratulas al la Stafeto same kiel al la kunlaborintoj, kaj ne malpli al la literaturama Esperanta publiko.

Pu.

En la belliteratura serio de la eldonejo Stafeto ĵus aperis la 10-a volumo. Estas biblia dramo „JOZEFO“ de J. D. Applebaum. Ĝi disvolvas la ĝenerale konatan sorton de Jozefo, kiu estis vendita en sklavecon kaj fariĝis savanto de le Egipta tero kaj de la tuta sia gento. La dramo elektas el la legendo nur kelkajn epizodojn, kiuj ilustras la viv-karieron de Jozefo per riĉe pentrata medio. Ĝi uzas larĝe fluantan akcentan heksameton. Domaĝe, ke la ekstera ekipo de la dramo estas tiel pretendema, ke la ludo apenaŭ estas uzebla por la modestaj esperantaj scenejoj.

Tiu ĉi libro, kvazaŭ jubilea, estas akompanata de serio da artikoloj pri unuopaj ĝis nun aperintaj Stafeto-volumoj.

Pu.

-

U. N. AFIŜOJ EN ESPERANTO. Fine de septembro aperis tre bela afiŝo, oficiala eldonaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, kun mallonga teksto en Esperanto. Tiu sukceso estas rezulto de siesto farita de UEA al la Ĝeneva Oficejo de U. N., kiu transdonis la aferon al la Sekretario de U. N. en New York. Tie niaj usonaj geamikoj Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, okaze de sia brila kongreso en New York, entreprenis pliajn paŝojn kaj, interkonsente kun UEA, prizorgis la prosigon kaj disdonon de la afiŝoj. Post la eldono de la UNESKO fotoafiŝoj kun teksto en Esperanto, tiu ĉi plia oficiala eldono signifas paŝon antaŭon por nia afero. Dankon kaj gratulon meritas ELNA.

SCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO EN ESPERANTO. Laŭ komisiono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, aperis en Esperanto, en eleganta 248paĝa eldono „Scienca kaj Teknika Terminaro“, verkita de inĝ. Rudolf Haferkorn kaj D-ro Kurt Dellian en kunlaboro kun Prof. F. J. Belifanto kaj multaj aliaj sciencistoj, inter kiuj la japana rektoro D-ro S. Nishi. La verko listigas la terminologion de 83 fakoj inter kiuj atoma fiziko, filozofio, geodezio, kirurgio, paleontologio, ktp. Post la difino, la vortoj estas laŭbezone nomataj en angla kaj germana aŭ latina.

-

ITALUJO DEDIĈAS SIAN UNUAN STRATON AL LA INTERNACIA LINGVO. Laŭ unuanima decido de la urbestro, inaŭguriĝis en Pisticci (itala urbeto en provinco de Matera) strato kun nomo „Esperanto“. Kvankam en Milano kaj Bologna troviĝas stratoj dediĉitaj al la kreinto de Esperanto, dro L. L. Zamenhof, tiu de Pisticci estas la unua strato en Italujo, kiu rekte honoras la Internacian Lingvon. Ekzistas en la mondo ĉ. 80 stratoj kaj placoj kun la nomo de Esperanto aŭ de ĝia kreinto.

-

NUNTEMPA BULGARIO: Abonu ĉi tiun tre belan kulturan esperantan revuon – sed ni vere embarasas kiel vit ion faru. – Laŭ la konsilo, kiun ni ricevis de la eldonejo, ni **ĉesas** kolekti la abonpagojn! La informo, kiun en la sama letero la administracio donas al ni, ke monon kolektos ARTIA en Praha, montriĝis absolute erara. Ne sendu monon al Artia, ĉar ĝi ne okupiĝas pri distribuado. ORBIS, kiu estas kompetenta fari tion, deklaras, ke por 1958 estis necese abonpagi ĝis fino de septembro; sekve do estas jam malfrue. Turnu vin do direkte al NUNTEMPA BULGARIO, str. Levski 1, SOFIA, Bulgario.

-

S-ano JOZEF MISTRÍK, prom. Pedago, estis nomita direktorko de Ŝtata stenografia instituto en Bratislava. Antaŭ jaroj li instruis Esperanton en tiama komerca lernejo en Trenčín, pri kio oni povas legie n „Esperantisto Slovaka“. Li estas ankaŭ aŭtoro de lernolibro, en kiu aperis la artikolo pri Esperanto. Ni sincere gratulas al la samideano Mistrík!

-

AUFBAU UN FRIEDEN, organo de germanaj laboruloj en Ĉeĥoslovakio aperigis jam plurfoje informojn pri nia movado. En sia 65-a nro ĝi informas pri la organo de MEM „LA PACO“ en naŭlinia artikoleto.

-

UNU-MONATA AKTIVECO EN PRAHA. Sub tiu titolo skribas la „Franca Esperantisto“ (majo 1957) pri la aktiveco de la EK en Praha, menciante la regulajn kunvenojn de la Klubo kaj de la Junularo, citante titolojn de prelegoj. Artvesperon de Verda Ĉaro de J. B., grandan amplekson de nia Bulteno kaj finante per la vortoj: „Ni gratulu, kaj imitu niajn Pragajn gesamideanojn!“

-

POLA GEEDZIĜA OFICEJO „SWATKA“, kies celo estas (speciale por geesperantistaro)feliĉege helpi la solulojn kaj diskrete kunigi esperantistajn geedzojn. La oficejo netas laŭ deziro kandidatojn el pli ol 10 landoj. Informojn deziru kontraŭ unu respondkupono de SWATKA, Łódź, Piotrkowska 133, Pollando.

-

ESPERANTISTAJ INTERPRETISTOJ ĈE LA UNIVERSALA EKSPozICIO DE BRUXELLES.

La Administracio de la Universala Ekspozicio en Bruxelles anoncis, ke estos disponigitaj al la vizitantoj ankaŭ tradukistoj por la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj distigiĝos dank´ al speciala brakrubando. Multaj aliaj Foiroj, inter tiuj de Marseille, Lyon, Padova kaj Bologna, regule uzas Esperanton.

-

URĜA PETO. Volonte ni helpus pere de nia legantaro al nia litova kunlaboranto, kiu urĝe serĉas BOLŝOJ RUSKO-ESPERANSKIJ SLOVAR de KOLĈINSKIJ kaj IZGUR, redaktita de Poljakov kaj Ĥoĥlov, Moskvo 1931. Proponojn sendu al s-ano Anĉi Bárochová, Sokolská 17, Praha 2 – Nové Město, Ĉeĥoslovakio.

-

EN PARIZO INTERNACIA KONFERENCO DE LA POPOLUNIVERSITATOJ. Kun la partopreno de franca Ministro kaj de altaj funkciuloj de UNESKO, la unuan fojon en pasinta oktobro Popoluniversitatoj de diversaj landoj kunvenis en Parizo por Internacia Konferenco. La sola traduklingvo por la laboruj de la tri komisionoj, en kiujn dividiĝis la 145 partoprenantoj el 22 landoj, estis la Internacia Lingvo Esperanto.

FONDIĜIS „ALBERT SCHWEITZER-KOMITATO“. Baldaŭ post la konata apelode Prof. Albert Schweitzer kaj pluaj 18 okc. germanaj atomscienculoj, fondiĝis en Groningen (Nederlando) „Komitato de Albert Schweitzer kontraŭ atombombaj eksperimentoj“. La komitaton gvidas nia kuraĝa kunbatalantino J. Le Rütte, Wasserbergstraat 9/IIa, GRONINGEN, Nederlando.

La komitato celas kontribuci por ĉiuj rimedoj al efektiviĝo de la „Albert Schweitzer-Apelo“. Kiel unuan taskon ĝi organizas tutmondan peticion al la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, postulante, ke tiu sin serioze okupu por atingi definitivan malpermeson de nukleas armiloj kaj ankaŭ malpermeson de eksperimentoj kun ili, ĉar tiuj jam grave damaĝas al la homaro.

Pere de esperantistoj jam cirkulas multaj subskriblistoj en la mondo. Ankaŭ M. E. M. aliĝis al tiu entrepreno kaj en preskaŭ ĉiuj landoj niaj perantoj organizas vigle kolekton de subskribuj por tiu apelo. En multaj urboj de ĈSR jam cirkulas listoj por kolekti subskribojn inter ĉs. civitanoj. La Ĉs. MEM-sekcio eldonis 2 000 presitajn listojn por kolekti en ĈSR 100 000 subskribojn pere de esperantistoj. Krom tio en multaj lokoj niaj geamikoj tretigis multobligitajn listojn kaj kolektis jam miliojn da subskribuj. Imitindan ekzemplon de aktiveco jam montris nia fervora pacdefendanto Marie BARTOVSKÁ el urbo Místek (Moravio).

Kiel unua respondis la Esperantista Klubo en Praha. Necesas kolekti subskribojn ankaŭ inter neesperantistoj. Pro tio ni eldonis dulingvajn listojn. En Okc. Germanujo jam cirkulas miloj da listoj. Nur en Hamburgo niaj gek-doĵ jam kolektis subskribojn sur 130 folioj. Nia devizo estas: Ĉeĥoslovakio devas prezenti al UN la plej multajn subskribojn. Kiu ankoraŭ ne ricevis la subskribliston, petu ĝin senprokraste ĉe MEM, k-do Rudolf Burda, Palackého nám. 6, Plzeň. Al tiu adreso sendu ankaŭ la jam subskribitajn listojn por registri kaj kalkuli la subskribojn.

„L. P.“

Ĉeĥoslovaka eldono, septembra numero de oficiala organo de M. E. M. „PACO“ aperis presite sur 12 normalformataj paĝoj kun vere interesa enhavo. Ni ĝojas pro la sukceso, ĉar post jaroj denove presforme aperas esperanta vorto.

NI SERĈAS kelkajn ekzemplerojn de la revuo NORDA PRISMO, nro 2/1956. Proponu al Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha 1.

Abonpago por 1958 de socia kaj literatura revuo NORDA PRISMO estos Kčs 34,--. Abonpago frutempe ĉe s-ano Jar. Šustr, Dlouhá 10, Praha 1.

Kiel ni ekscias, trafis HANS JAKOB, honoran redaktoron de Esperanto, grava akcidento. Motorciklo renversis lin kaj ĵetis kelkajn metrojn. Post dumonata restado en hospitalo li revenis hejmen kaj semajnon poste kaptis flebiton kun senkalkigo de l'ostoj, sekve de laciĝo kaj tro longa restado en lito – senmoveco. Monaton post lia malbonŝanco lia edzino falis surteren kaj rozpis la femuron... Ni kore kunsentas kun gesanoj Jakob kaj deziras al ambaŭ plenan baldaŭan resaniĝon!

LA JAPANA SCIENCO KAJ LITERATURO EN ESPERANTO. Surprizis nin tri broŝuroj, eldonitaj 1956 okaze de la 43a Kongreso de Japanaj esperantistoj por la Ora Jubileo de la Japana Esperanto-Movado. Ili estas:

a) „Bibliografio de Scienca Literaturo Esperanta en Japanujo“ kaj

b) „Bibliografio de Medicina Literaturo Esperanta en Japanujo“. En tiuj ĉi du libretoj estas listigitaj esperantlingvaj sciencaj verkoj, studaĵoj kaj resumoj, kiujn eldonis aŭ japanoj, aŭ eksterlandanoj en Japanujo. Ni povas nur supraĵe noti, ke en la unua libro, krom la ĝeneralsciencaj demandoj, enestas temoj pri matematiko, fiziko, geofiziko, astrofiziko, oceanografio, geologio, meteorologio, ĥemio, biologio, agronomio, agrikultura ĥemio, arbarscienco kaj inĝenierartoj, entute 32 paĝoj da titoloj.

La medicina science estis reprezentita tiel riĉe, ke la titoloj de tiuj ĉi temoj postulis specialan broŝuron (la duan el la cititaj), en la amplekso de 48 paĝoj.

Kun respekto ni relegas tiun ĉi revuon de la granda laboro de l' japanaj samideanoj, kiuj montras la vojon al la praktika aplikado de la Internacia Lingvo en la science. Ambaŭ broŝuroj estas ankaŭ dokumentoj de granda propaganda valoro.

La tria broŝuro de la sama serio estas:

c) „Bibliografio de Japana Literaturo tradukita en Esperanton.“ Sur 20 paĝoj estas listigitaj tradukoj de la literaturaj verkoj, presitaj en libroformo aŭ en revuoj aperintaj ĝis oktobro 1956. Imitinda ekzemplo por la aliaj nacioj!

Kaj jen kvara broĵuro el la Japaninsularo, aperinta okaze de la Ora Jubileo de la Japana Esperanto-Movado. Ĝin presigis la eldonejo La Orienta Stolo sub la titolo „Facila semoforo Esperanta“. La aŭtoro Joŝiroo Jamaguĉi elpensis sistemon de signalado per flagetoj, kian uzas la maristoj, soldatoj, skoltoj ktp. La metodo de la aŭtoro estas aplikebla ankaŭ en multaj lingvoj eŭropaj kaj aziaj. Interese estas, ke oni ne sinalas unuopajn literojn, sed principe silabojn, kiujn oni elsendas fonetike. La libreto havas 22 paĝojn kun tri paĝoj da bildtabeloj. Pu.

„KOMENIOLOGIA KONFERENCO“ kun reprezentantoj de sciencaj institutoj el 22 ŝtatoj, salutata per leteroj kaj telegramoj el ĉiuj mondpartoj, eventis la 23an ĝis 27an de septembro 1957 en Praha; ĝenerale oni konstatis, ke la brilaj principoj pedagogiaj estis por Comenius nur unua prepara paŝo al pansofia klerigo de ĉiuj homoj kaj al odifa packo kaj plibonigo de la homa socio. Aktuale graveco de „Panglottia“ estis menciita precipe de akademiano Otokar Chlup kaj Dro T. V. Miškovská. Oni povas do esperi, ke ĝi baldaŭ eldoniĝos en originalo latina, samkiel en ĉeĥa traduko de Josef Hendrich.

(OT)

COMENIUS BIBLIOGRAFIO de Josef Brambora (knižní dílo J. A. Komenského, Praha 1957, Kčs 5,80) sur paĝo 145 mencias la artikolon de Josef Hendrich pri „Panglottia“ en la revuo „Esperantista“ VI.1951, nro 11. (AK)

„NOWA DOBA“ la ĉef-ĵurnalo de Serboj luzaciaj (Budyšin-Bautzen, GDR) en la nro 203 (2.9.1957) reprenis la dualinean artikolon de Dro E. A. Bokarev pri lingvo internacia el „Literaturnaja gazeta“ (18.8.1957) manifestante tiamaniere plenan simpatian al nia movado. (AR)

NORDA PRISMO nro 4/1957, kun kvarpaĝa artikolo de komeniologo Josef Hendrich, pri „Panglottia“ kaj kun Comenius-bildo sur la kovrilo, estas afrankite ricevebla je prezo Kčs 5 ĉe EK Praha (Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha 1).

LETERO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO AL ĈEĤOSLOVAKA AKADEMIO DE SCIENCJOJ.

MV/NL

la 18-an de oktobro 1957

ČESKOSLOVENSKÁ AKADEMIE VĚD

Praha, Ĉeĥoslovakujo.

Estimataj sinjoroj,

ni havas la honoron informi vin, ke la supera organo de nia Asocio, la internacia Komitato, en kiu estas reprezentitaj 25 landoj, en siaj plenaj kunsidoj dum la 42-a Universala Kongreso en Marseille unuanime decidis prezenti al via Akademio deziresprimon, ke estu eldonita la verko „Panglottia“ de Komenius en la Internacia Lingvo Esperanto.

La Komitato kaj la menciita Universala Kongreso de Esperanto, en kiu partoprenis 1468 kongresanoj el 38 landoj, deziras, ke estu tiel plej taŭge honorata la granda ĉeĥa filozofo, kiu inter la unuaj pensuloj, jam en la 17a jarcento antaŭvidis la solvon de la demando de Internacia Lingvo, kia ĝi efektiviĝis poste en 1887 per la naskiĝo de Esperanto.

Transdonante al vi la supran proponon, ni kun ĝojo atentigas vin, e nia Asocio estas je via dispono por ĉiu kunlaboro necesa por ĝia efektivigo.

Kun plej sinceraj salutoj

via M. H. Vermaas, direktorino C. O.

--

VÁCLAV KOPECKÝ, ĉs. vicministroprezidanto per propre skribita letero dankis al nia Klubo pro la bondeziroj okaze de lia vivjubileo.

--

ČERVENÝ KVĚT (RUĜA FLORO), kulturpolitika monata revuo aperanta en Ostrava, estas enhavoriĉa altnivela 21x29 cm formata legindaĵo. Kvankam eldonata por regionaj celoj, legata ĝi estas tutŝtate. Favoran sintenon por nia movado montris la redakcio en la 10-a numero per du informaj artikoloj (ASt: Jubileo de Esperanto, ph: Esperanto-helpa lingvo). Ankaŭ aliloke ni legas la vorton Esperanto. Por niaj ĉeĥaj legantoj ni rekomendas tiun ĉi revuon.

-jelĉ-

--

„70 JAROJ DE ESPERANTO“ ekzpozicio en Brno okazis en palaca Artindustria Muzeo en Brno de la 13a ĝis 29a de oktobro. Estis ekspozicataj ĉ. 300 libroj, la plej gravaj kaj imponuj, ĉ. 200 prospektoj, la plej efikaj afiŝoj, UNESKO foto-afiŝoj, speciala vitrino kun valoraj japonaĵoj, specialaj du vitrinoj kun la plej belaj bildkartoj kaj ĉiuj Esperanto-poŝtmarkoj, pli ol 70 Esperanto-gazetoj, de ĉiu speco plejparte po 6 ekzempleroj kaj desegnaĵoj humuraj faritaj por la ekspozicio. Ĉion kompletigis sloganaj surskriboj artisme faritaj de s-ano Jaroslav Smečka, eksperto pri reklamo, sub kies gvido kaj per lia laboro la ekspozicio estis instalita. La ekspozicio estis aranĝita ege plaĉe, kun granda belgusto kaj estis ĝenerale multe laŭdata. Vizitis ĝin ĉ. 3 000 homoj. La ekspozicio estis longe preparata, dum jaroj estis kolektata materialo, kiu poste (nur la plej bela) estis uzita. Inaŭguris direktorko de Kultura Domo s-ro Špička, solenan paroladon havis la prezidanto de EK s-ano Josef Vondroušek.

Dum tri semajnoj 300 grandaj afiŝoj anoncis la ekspozicion kaj varbis por la kursoj. Aperis favoraj artikoloj, ne malgrandaj, pri la ekspozicio, kiu estis vere granda entrepreno.

Ĉiutage matene kaj posttagmeze deĵoris iu el lokaj samideanoj, plej ofte s-anino M. Adamcová. S-ano Smečka krome pentos kelkajn artismajn afiŝojn, kiuj estis lokitaj antaŭ la Artindustria Muzeo kaj en la vestiblo.

--

Georgo Deŝkin: ELEKTITAJ VERSAĴOJ 1909-1956. Eldonis Serbia Esperanto-Ligo, Terazije 42, Beograd, Jugoslavio, kiel sian 7an volumon de serio Nova Libro en septembro 1957.

Per 51 elektitaj poemoj prezentiĝas poeto al multaj el ni nekonata, kvankam temas pri poeto premiita jam en jaro 1913. Tial surprizas nin la versoj de Georgo Deŝkin per sia alta nivelo. Ni renkontas en li poeton de konvinka esprimivo, kiu elkantas melankolion de sia impresiĝema, amsopira koro, trompita de vivo kaj malespere suferanta, kun intermituj per kurta feliĉo kaj ĝojesperoj. La ĉeftemoj: trompita kaj vana amo, mornaj perspektivoj de la vivaŭtuno, estas en pluraj poemoj majstre sonigitaj, kiel ekz. en „Al Kruela Reĝino“, „Mi vagas en mallum“, „Rememoroj“, „Kiel klaŭno“, „Sen cel' vaginte“ k. a. El artisma vidpunkte ĉi tiuj elegiaj korelkrioj superas la poemojn pri temoj aliaj, ekz. esperantisto. Per tiu ĉi kolekto viciĝas Georgo Deŝkin inter bonajn Esperanto-poetojn, malgraŭ, ke li uzas simplan lingvon sen frapanta invokto en vortelekto kaj rimfreŝeco. Tiun prezon ne povas redukti la fakto, ke ie kaj tie la perfortita vortordo, ekz. postato de artikolo aŭ prepozicio, impresas arkaizme. Parentezo, Deŝkin kun multaj aliaj poetoj neglektas, ke estas vana elizio ĉe vortoj: majstr', patr', sabl', do ĉiuj vortoj, kie la akcentan vokalon sekvas du aŭ pluraj konsonantoj, el kiuj la lasta estas likvidoj „r“ aŭ „l“. Tiuj ĉi du konsonantoj funkcias duonvokale kaj transprenas tuj funkcion de la silabokrea vokalo, kiam oni la finvokalon forigas. Tial patr' restas same dusilas kiel patro, majstr' kiel majstro, tabl' kiel tablo. Nur per orekonfuzo de postato de vokale komenciĝanta vorto oni iam povas forĵongli silabon: patr' amata. Pro tiu ĉi karaktero de likvidoj „r“ kaj „l“ la akcentvokaloj ekz. en vortoj patro, sablo, ebla ktp. estas plej ofte prononcataj longe, kvazaŭ ilin sekvus nur unu konsonanto.

La bonnivela libro estas zorgme redaktita de B. M. Radakoviĉ kaj malhavas preserarojn. La broŝurita 54-paĝa volumo kun kovrilo desegnita de N. Maksimoviĉ kostas 0,6 us.dol. aŭ 9 stelojn. Ni rekomendas ĝin al ĉiu amanto de bona literaturo.

Jiří Kořínek

--
URĜEGA ATENTIGO AL s-ano Lic. TIBOR SEKELJ en KATHMANDU-NEPAL. S-ano Mag.Mieĉislav ZGÓRZEWSKI, WROCLAW 2, skrytka pocztowa 22, Pollando petas vin pri baldaŭa alsendo laŭ la indikita adreso de 3 interesaj viaj verkoj en okcidenta aŭ esperanta lingvoj. Du grandaj polaj eldonejoj intencas eldoni viajn verkojn. Ĉar s-ano Sekelj estas konstanta leganto de nia Bulteno kaj persona konatulo de la redaktoro, li akceptu ne nur niajn dankojn pro sia laboro por Esperanto en Nepalujo, sed ankaŭ tiun ĉi gravan sciigon.

--
POR DIVERSPECA PERIGA SERVO oferas sin Mag.Phil.M.Zgórzewski, WROCLAW 2, skrytka pocztowa 22, Pollando – literaturisto, publicisto. Demandante aldonu 2 respondkuponojn.

LA GRAMOFONDISKOJ KUN KOMPONAĴOJ de s-ano RADIM KUDLA, anoncitraj en nia pasinta n-ro de Bulteno elĉerpiĝis kaj por certa tempo estas ne haveblaj.

--
KLARIGOJ AL „LETEROJ EL PRAHA“: 1) temis pri enketo, 2) nur komence de oktobro atingitaj postulataj 3000 aliĝoj, necesas ankoraŭ statistika prilaboro, 3) eldonprojekton prikonsideras nun kompetentaj lokoj, 4) dankon por ĉiuj esprimoj de simpatio kaj subtenpreteco, 5) pardonpeto, ke pro manko de privata nomo ne eblis respondi ĉiujn korespondaĵojn. Ĉiuj aliĝoj bonorde registritaj, 6) represoj petata. Jožko Staněk, ĵurnalisto, Osadní 45, Praha 7 – Holešovice, Ĉeĥoslovakio.

--
ESPERANTO EN CEJLONO – el letero de nia leganto cejlona Sanghano Njanasatta Thero: Kiam mi en 1936/7 klopodis veturi al Cejlono, britaj amikoj rekomendis min al Esperantisto, kiu vivis en Cejlono kiel sanghano (Budhana monaĥo). Sanghano Njanadipo el Berlino, en Cejlono ek de 1934-37 estis samideano antaŭ mi en Cejlono. Eble inter la kristanaj misiistoj el Eŭropo en Cejlono estis esperantistoj, tio ankoraŭ ne estas certa. Cejlonaj sinhaloj certe sciis pri Esperanto antaŭ ol okcidentaj sanghanoj venis al Cejlono, ĉar en la fama Templara Librejo de Vajirarama en Kolombo lernolibro de Esperanto troviĝas. Ĝi estis donacita al la Librejo antaŭ pli ol 20 jaroj kaj uzita; kio pruĝas, ke oni lernis Esperanton en nia lando. Kiam mi venis en la landon la 15-an de marto 1938 mi trovis en la Librejo de Island Hermitage, DODANDUWA, Ceylon, kelkajn tekstojn esperantajn, vortaron esperanto-germanan-germana-esperantan, publikaĵojn pri budhismo en Esperanto; kaj miaj leteroj kaj presaĵoj kaj la rekomendo sendita al s-ano Njanadipa (kiu mortis antaŭ ol ricevi ĝin) estis komprenitaj de la Estro de la Budhana Monaĥejo, la Sangestro Njanatil oka, kiu certigis min, ke li komprenis ĉion en la letero, kaj povis legi poemojn en Esperanto kaj ŝati ilian belecon, ĉar li estis lingvisto naskita en Eŭropo kaj konis plurajn eŭropajn lingvojn. Tiu Sangestro (19.2. 1878 Wiesbaden – 28.5.1957 Colombo) estis konata al ĉiuj budhanaj samideanoj.

Pri Esperanto-vivo en Cejlono oni ne povas skribi: kvankam dum miaj preskaŭ 20 jaroj en Cejlono mi instruis almenaŭ 20 homojn, doninte al ili senpage lernolibrojn kaj jarlibrojn, eĉ insignojn, kiam mi perdis kontakton kun ili, Esperanto ne plu aŭdiĝis. Krom mi, alia veterano, brita eksmajoro R. Raven-Hart ofte vivas en Cejlono por monatoj kaj vizitadas min, skribas pri Esperanto al anglaj gazetoj kaj subtenas min en laboro poreseperanta, kiel per pagado de kotizoj, mendo de libroj ktp. Li ankaŭ helpas min en miaj anglaj publikaĵoj por pruvi praktikan utilecon de Esperanto. Mi ofte kontribuis artikolojn al la BUDHA LUMO, organo de la Budhana Ligo Esperantista, kaj pro tiu kunlaboro mi en 1955 atendis kunlaboranton el Britujo. Atendante kapablam helpanton en Esperanto-publikaĵoj, mi anoncis eldonon de Esperanto-revuo JUBILEO financiita de la ŝtato okaze de la jubileo de 2500 Jaroj de l' Budhismo. La samideano venis, la gazetraportistoj renkontis lin, la Ĝenerala Sekretario de la Budhana Konsilantaro sendis Subredaktoron por intervjui laveninton, kaj post tio niaj publikaĵoj en Esperanto ne estis aprobitaj.

La samideano ne estis plaĉa homo, estis surd, iom moroza anglo, kiajn oni ne ŝatas. La ŝanĝo de l' registaro komence de 1956, ŝanĝo de direktorko, ministroj kaj ĝeneralaj sekretarioj por Budhanaj Kulturaferoj, malebligis eldonon de budhana literaturo esperanta post kiam tio estis promesita kaj anoncita. Nur dupaĝaj artikoloj en Esperanto aperis 5-6 foje en la angla monta revuo JAYANTI. Ni akiris nian literaturon por ĝi paginte, sed tio ne sufiĉas: ni klopodas eldoni pli bonan kaj ampleksan literaturon, se ni viros subtenon.

Nun mi havas tri lernantojn, junajn klerajn sinhalojn. Se ili daŭrigos la lernadon, eble ni baldaŭ havos pli da esperantistoj, sed en la Oriento ĉio kreskas rapide kaj ĉio pereas eĉ pli rapide kun rapideco de ĝangala kreskado. Kio malhelpas mian laboron estas miloj da leteroj de scivolemaj gejunuloj, tute ne interesitaj pri budhismo, sed nur pri pm., pk. kaj korespondado, por kiuj mi vere ne havas tempon nek asistanton. La Budhana Esperanto-Instituto estas vere nur sinonimo por kaduka nun monaĥo 50 jara, kun tremantaj manoj pro troa skribado kaj difektaj okuloj pro troa laboro. En iamaj britaj kolonioj la konvinko, ke la angla lingvo estas ja la vera lingvo universaliala malhelpas nian laboron.

Njanasatta Thero.

--

EL LA MOVADO DE NIAJ NAJBAROJ KAJ AMIKOJ.

BULGARUJO.

ESPERANTO KAJ BULGARAJ GIMNAZIOJ. Oficiala organo de la ministerio por instruado kaj kulturo „Uĉitelsko delo“ en sia oktoda numero aperigis artikolon de Ĥristo Vasilev, science kunlaboranto de la Pedagogia Instituto ĉe la Bulgara Akademio de Sciencoj. La artikolo proponas enkondukon de Esperanto kiel nedeviga en novan instruplanon por kvara ĝis sesa klasoj de gimnazioj po du horoj semajne. Estas tre verŝajne, ke la propono realiĝos, ĉar Esperanto estas alte taksata en Bulgarujo kaj k-do Vasilev proponis ĝin kvazaŭ en la nomo de la ministerio mem. (Iaŭ Heroldo de Esperanto)

NUNTEMPA BULGARIO estas vere ĝojdona revuo informanta ĉiufanke pri la frata Bulgario. Bonega papero surhavas kvalitan preson preskaŭ sen eraroj. Multaj ilustraĵoj permesas al la leganto ankoraŭ pliprofungiĝi en la ĝeneralan scion pri la lando, popolo, konstruado de la lando, vivceloj, geografio ktp. La esperantistojn speciale interesas la paĝoj, kiuj alportas gravajn raportojn primovadajn en nia vivsfero. Ni esperas, ke la abondemando estos baldaŭ solvita kaj ni povos reboni tiun ĉi kvalitan informilon.

-jelĉ-

La maja-junia Bulteno alportis artikolon pri esp.movado en Bulgario, en kiu troviĝas aludo pri preseta lernolibro. Do, tiu lernolibro (kaj legolibro) de Ivan Sarafon kaj Simeon Hesapĉiev jam aperis komnce de majo. Ĝiaj 170 paĝoj enhavas dudek ses lecionojn kaj abundan aron de diversaj artikoloj, tradukaĵoj, poemoj, proverboj ktp. La eldonkvanto estas 6 000 ekz.

--

Esperanto en BULGARA RIVIERO. En 30-a nro de Literární noviny ni legas en fejtano „Bulgara riviero“ de Jaroslava Reitmannová: ... en nia hotelo oni aŭdis krom lingvo bulgara inter sep kaj pli multe da lingvoj ankaŭ Esperanton...

O. G.

--

HUNGARUJO.

Nia hungara korespondanto Paŭlo Balkányi informas:

En Budapest estis s-anoj Rajska, prezidanto kaj I. Dratwer, ĝen.sekretario de la Asocio de Esperantistoj en Pollando. Ambaŭ estis oficiale akceptitaj ĉe la Kulturministerio kaj ĉe Landa Packonsilantaro. – Ankaŭ pola kaj bulgara etaj esp.karavanoj travojaĝis la ĉefurbon.

Dum someraj monatoj oni inaŭguris en gravaj lokoj – urbo SZEGED straton kaj en urbo MISKOLCZ placon de Esperanto. Ĉe ambaŭ oni solene metis memortabulojn. Ankaŭ ĝi nun estas ĉe la nove inaŭgurita „Esperantista fonto“ en montaro Pilis, nordokcidente de Budapest, kiu nomo estas sur ĉiuj turistaj landkarto, kiel ekskursloko!

Ĉe Hungar-Sovet-Amika Societo ni fondis Esp. amikan rondon, kiu ja (per ni) rekte interriltas kun sovetanoj, do efektivas fakte amikecon.

La ĉefurba Kulturekscio sur afiŝetoj en tramoj konigis la liston de studobjektoj, kie kursoj estas malfermeblaj en ĉiuj distriktoj. Inter ili estas ankaŭ Esperanto. Simile la Pedagogia Sindikato havas jam nun kurson kaj la Popolĉeflernejo de Sciencdisvastiga Societo, kiu havas same unu kurson. Pri la lasta raportis ankaŭ nia radio.

La hungaraj esp. poŝtmarkoj estas nur kelkloke kaj nur en limigita kvanto aĉeteblaj. La serio de du neuzraj kostas 3 respondkupononjn aŭ kontraŭvaloron laŭ antaŭa interkonsento. Bv. kontaktiĝi tiurilate kun Pál Balkányi, Budapest II, Peshidegkut, Marast u.33, Hungarujo.

La instrua kaj kultura sekcio de la urba konsilantaro de urbo SZEGED donis permeson instrui Esperanton (nedevisa studtemo) en ĉiuj mezaj kaj ĝeneralaj lernejoj de la urbo, kie estas lingvoscia pedagogo. Pro ties manko nur en kvar lernejoj komenciĝis kurso. Ankaŭ la szegeda universitato publikigis la eblecon de kurso.

En universitato de Budapeŝt kaj en ĉeflernejo de Eger komenciĝis Esperanto-kurso.

La hungara Akademia Eldonejo pretigas la aperigon de 600-paĝa plena Esperanto-Hungara vortaro por marto 1958. Verŝajne samdate aperon en la Ŝtata Lernolibra Eldonejo la tralaborita gramatiko de Julio Baghy.

La revuo de la Mondfederacio de la Demokrata Junularo en hungara lingvo „Világ Ifjusága“ (Junularo de l'Mondo) havas en ĉiu monata ledono ampleksan esperantorubrikon redaktitan de ĝen.sekretario Lajos Márton. En novembro n-ro aperis foto kaj detala vivhistorio de Julio Baghy.

La landa Packonsilantaro projektas eldoni kelkpaĝan informilon de sia Esperanto-Komitato. Ĝi ankaŭ sendas al petantoj afiŝon kontraŭ la H-bombo. Adreso: Budapeŝt VI, Népköztársaság-uzja 124, Hungarlando.

La nova Hungara Esperanto-Instituto, kiu funkcias kiel eldona kaj vendeja fako de la Landa Esperanto-Konsilantaro, havis dum sia unua jaro tre bonan prosperon kun konsiderinda profito, kio ebligas la eldonon de inferma kajero pri Esperanto.

La „Paco“ Esperanto-Fakrondo ĉe la V-a distrikta Kulturhejmo en Budapeŝt, Engelplaco, aranĝis festkunvenon la 7-an de novembro, kiam s-ano Julio Baghy parolis pri siaj rememoroj el la siberia militkaptiteco, rakontante siajn travivaĵojn okaze de antaŭ kvardekjara revolucio. Kolomano Kalocsay prezentis sian plej novan traduj de efika poemo de Majakovski. Kiel gasto Prof. Simeon Hosapĉiev el Sofia rakontis pri la progreso de nuna evoluo de la bulgara movado kaj pri la seriozaj rilatoj kun la Granda Enciklopedia redaktantaro kaj kun sovetaj lingvistoj, kiuj nun favoras Esperanton. Pri tio aperis artikolon la bulgara lingvosciencia revuo kaj ankaŭ la Bulgara Akademio esprimis favoron al Esperanto. La sukcesan vesperon finis reklamo de Prof. Ludoviko Kökeny.

--

ĈINIO.

La 2-a n-ro la BULTENO de Ĉina Esperanto-Ligo estas eleganta kaj certe reprezentanta informilo (Julio 1957). Nian sinceran gratulon akceptu niaj ĉinaj geamikoj, ke ili responde al la disvolviĝanta movado povas nun ankaŭ doni en manojn de siaj novaj adeptoj respondan informilon. Kvankam ni bone komprenas, ke la Bulteno estas destinita nur por ĉinlingvaj esperantistoj, ni envie foliumis kaj ĝoje el diversaj latinliteraj vortoj ekkomprenis, ke enhavo priparolas ankaŭ la esperanto-laboron en Ĉeĥoslovakio. Same unu el la ĉefartikoloj estas respondo de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj je demandoj de la Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en Ĉeĥoslovakio, respondo, kiu estiĝis bazo por akiri pli larĝajn laboreblecojn por nia movado en ĈSR.

-

ĈINA ESPERANTO-LIGO ANONCAS: La movado en nia lando konstatne kreskas, kvankam ne tre rapide. Nun en nia Ligo laboras jam 4 samideanoj, ankoraŭ pli ol 6 s-anojn ni devos venigi.

Du kursoj en Pekino kaj Ŝanhajo finiĝis. El pli ol 130 lernintoj ni sukcesis edukci 34 Esperantistojn. Tio estas normala proporcio por sukcesintoj en la fremdlingva lernado. Novajn kursojn oni preparas. La plej kuraĝiga eble estas la fakto, ke ni sukcesas enkonduki Esperanton en la Popolan Universitaton en Pekino. Lunde la 16-an de septembro k-do Ĵelezo (Je Laishi) faris por ĝi la unuan prelegon. Oni registris poste 40 studentojn-sinanoncintojn por tiu kurso. Ĉar ĝi estas tasko nedeviga jak ni instruos ĝin dum la oficialaj instruhoroj, la lernantoj ne povas esti tro mutaj. Tamen estas por la unua fojo, ke Esperanto estas instruata en nia universitato kiel lerna tasko – ni do povas rigardi la fakton iel granda sukceso.

La alia oficiala subteno venis de kultura ministerio de nia Registaro kaj de la Asocio por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando. Ili komune la 1-an de septembro sendis cirkuleron al siaj suborganizoj en ĉiuj provincoj kaj grandaj urboj, ke la suborganizoj subtenu kaj gvidu E-movadon en sia loko.

Novan E-gazeton ni preparas, sed estas multaj teknikaj malfaciloj, precipe rilate la presadon. Tamen ni klopodas ĝian unuan numeron aperigi en tiu ĉi jaro (1957 – kaj sukceso ĝi aperis, rim. de la red.). Krom la pli supre anoncita kurso ĉe la universitato, startis en Pekino la vespera kurso ĉe la sama altlernejo kun ĉ. 60 studentoj.

-

Ĉinaj, Sovetia kaj Germanaj Esperantistoj en PEkino festis la 40-an Datrevenon de Oktobra Revolucio. – Je la 20-a de oktobro okazis festa kunveno por 40-a jardatreveno de Oktobra Revolucio, kunvokita de la Ĉina Esperanto-Ligo. Partoprenis proksimume 60 esperantistoj, inter ili ankaŭ sovetia esperantisto Prof. D. L. Armand, specialisto de sciencaj studoj pri problemoj de la Flava Rivero kaj germanaj k-doĵ Luz kaj Salzmann, studentoj en Pekina Universitato. Per la solena kantado de La Internacio komenciĝis la kunveno. K-do Hujucz, prezidanto de ĈEL faris malferman paroladon esprimante gratulon por la festo kaj dankon al k-do D. L. Armand, kiu tuj viros Sovetion. Poste k-do ChangChich-en, sekretario de la Ligo, raportis pri la signifo de la Oktobra Revolucio kaj pri la pasintaj kunlaboro kaj amikeco inter ĉinaj kaj sovetiaj esperantistoj kaj esprimis la esperon renovigi ilin.

La plej aplaŭdata parolado estis tiu de k-do D. L. Armand. Li raportis pri kunlaboro kaj amikeco inter Ĉinio kaj Sovetio en sciencaj sferoj, pri Esp. movado en Sovetio kaj ĝia promesdona estonto. Germana k-do Salzmann ankaŭ esprimis sian gratulon al la festo. Poste k-do Laŭlum deklamis sian nove verkitan poemon pri Oktobra Revolucio. Fine la kunveno aprobis gratulant telegramon al Sovetio kaj donacis pere de k-do D. L. Armand silkan flagon kaj subskribojn de ĉeestintoj al sovetiaj esperantistoj por esprimi sian saluton kaj esperon pri disvolvo de amikeco kaj longdaŭra paco.

Federacio de Demokrataj Junuloj en Ŝanhajo: fondita Esperanto-studrondo kun 22 finlernintoj, kiuj sukcese trapasis la kurson de marto ĝis aŭgusto. La rondeto nun kunvenas ĉiun duan mardon en la nova sidejo de la Federacio de Demokrataj Junuloj (200 Kiangsi Road/middle/Ŝanhajo/0/).

Same la Pac-Komitato de Tientsin pere de s-ano Yang Y-Kun informas nin pri ĝojigaj sukcesoj de Esperanto en tiu ĉi grandurbo.

POLLANDO.

POLA ESPERANTISTO-ESPERANTISTA POLSKI (nro I, sept.-okt.1957), organo de Asocio de Esperantistoj en Pollando aperis grandformate sur 16 prespaĝoj en speciala kovrilo tutverda, bele aranĝita. Ĝi promesas aperi dum dumonato. El plej varia interesa enhavo, kiu plene informas pri la movado ĉe niaj najbaraj amikoj same ankaŭ pri alilandaj esp. interesaĵoj, nin speciale tuŝis la artikolo „Rememoroj pri la lastaj jaroj de mia patro“ de Adamo Zamenhof (represita el la kongresa gazeto „La Jubilea“ – 1937, Varsovio), „Kun s-ino Alamo-Sandgren tra Polujo“, „La 44-a Universala Kongreso de Esperanto 1958 en Varsovio“ kaj aliaj. Ni gratulas tiun ĉi feliĉan starton.

Praha-ek-1958-50-17

BULTENO PRAHA 50-1958

- 17 -

Laŭ instigo de Esperantista Klubo en Praha la Pola Informa Servo helpe de propaganda materialo de la menciita klubo aranĝis belan ekspozicion kun busto de la Majstro en sia elmontra fenestro ĉe angulo de Venceslaa placo kaj strato Jindřišská. La ekspozicio honore al la decembra jubileo de la Majstro altiras atenton de multegaj pasantoj, ĉar senriproĉe temas pri plej frekventita loko el la tuta ĉefurbo.

En pola granda ilustrita semajna revuo „KULISY“ (kulisoj) nro 30 de 15.9.1957 eldonita en Varsovio (semajna eldonkvanto 252 000 ekz.) aperis ampleksa kaj interesa artikolo pri Esperanto „Biorzmy się do Esperanto“ (Ellernu Esperanton). Artikolon prilaboris vrocava s-ano literaturisto-publicisto mag.fil.Mieĉislav Zgórzewski, kiu plene elĉerpis ĉiujn detalojn, kiuj povas kapti la intereson de la leganto Ago certe sekvenda!

SOVETUNIO.

En ĉefurbo de Litovia SSR Vilnius vivoplene funkcias centra Esperanto-rondeto fondita en aprilo 1957 ĉe la Klubo de Konsilantaro de Profesiaj Unuiĝoj de Litovia SSR. La rondeto unuigas pli ol 500 geesperantistojn de Vilnius mem kaj ludas gvidan rolon en Esperanto-movado de Litovia SSR. Pri informoj ĉiuspecaj bv. sin turni laŭ la adreoso de la rondeto: VILNIUS, Gorkio 92, PROFSAJJUNGUTARYBA, Esperanto ratelis.

En RIGA, ĉefurbo de Latvia SSR aperis 30 000 leterkovertoj por esperantistoj, kiuj trafe propagandas en la rusa kaj Esperanto-tekstoj la Internacian lingvon. Sur la koverto estas alvoko „Lernu kaj disvastigu Esperanton, la internacian lingvon de paco kaj amikeco. „Sekvas silueto kaj parolturno de A. M. Gorkij: „Konservativa penso obstine pruvas, ke Esperanto estas utopia entrepreno. Viva, laŭleĝa evoluanta realeco ne rapidante, sed ĉiam pli decidoplena refutas la opinion de la konservativuloj... Tiu ĉi artefarita lingvo... fariĝas tute natura fenomeno, ĉar ĝi respondas al bezono de nuntempaj homoj trovi, krei por ĉiuj kompreneblan lingvon.“

Konata pedagogo el armenia Erevano, esperanta veterano Simon Mkrticjan dum sia vojaĝo al Moskvo kaj Leningrado vizitis ankaŭ estonajn esperantistojn en Pärnu kaj Talinn. La renkontiĝo kun tiu ĉi altŝatata malproksima gasto, liaj prelegoj, vekis grandan intereson kaj entuziasmon, de novaj adeptoj speciale.

Kiel ni jam raportis, en Leningrado aperis unua postmilita lernolibro de Esperanto – en 95 000 ekz. Aŭtoro estas kandidato pri filologio N. D. Andrejev. Eldonanto: La Leningrada sekcio de la Asocio por la Disvastigo de politikaj kaj sciencaj konoj de Rusa Federacioa Soveta Socialista Respubliko.

En KAUNAS la 28-an de aprilo 1957 okazis la respubika kunveno de esperantisto jen Litova SSR. Dum la kunveno, multnombre vizitita, estis elektita La komitato por reorganizi la asocion de esperantisto jen LSSR.

La Vilna respublika radio-stacio jam plurfoje disaŭdigis ampleksajn priesperantajn informojn de s-ano Medonis el Kaunas.

VIETNAMIO.

En junio startis en Hanoi kurso de Esperanto por 450 funkciuloj de centraj kaj ĉefurbaj oficejoj kaj popolorganizoj. Inter la kursanoj troviĝas pluraj profesoroj, verkistoj, artistoj kaj ĵurnalistoj. La kurso estis organizata sub la patroneco de s-roj Hoang Minh Giam, ministro por kulturo kaj Nguyen Van Huyen, ministro por klerikado. La inaŭguron ĉeestis krom la vietnama ministro por kulturo, gemembroj de la Centra Komitato de Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio, la sekretarioj por kulturo de la sovĉeta, ĉina, hungara, bulgara, pola, ĉeĥoslovaka k. a. ambasadorejoj. Specialan atenton akiris k-do Viliam Hajdúĉik, unua sekretario de la ĉeĥosl. Ambasadorejo, kiu parolis esperante al la gekursanoj pri la efektiva rolo, kiun ludas la Internacia Lingvo en la batalo por la mondopaco kaj por la amikiĝo inter la popoloj. Unuanime aprobita rezolucio pri la malpermeso de uzado kaj eksperimentado kun atom- kaj hidrogenbomboj, estis adresata al la Mondpaca Konsilantaro kunvenanta en Kolombo. Esperanto ĝuas ĝeneralan subtenon kiel altvalora porpaca faktoro.

Laŭ la raporto en PACO.

- - - -

ESPERANTISTA VIVO EN ĈEĤOSLOVAKIO.

BOJKOVICE: Kultura klubo de Vlárské závody komencis 4. 12. 1957 kurson kun 20 entuziasmuloj. ALiĝas novaj interesuloj. Kurso aranĝata en nova Kulturdomo. Gvidas s-ano Jan Tichoň. Por propagandi la kurson eldonitaj trafo belaj dukoloraj afiŝoj.

BRNO: post la sukcesa ekspozicio, pri kiu ni raportas alipaĝe, startis tri kursoj: instruisto J. Vondroušek (42 personoj), J. Kořínek (25 personoj) kaj S. Střelec (17 personoj). Regule eldonata Bulteno (dupaĝa) enhavas ĉiujn plej gravajn enlandajn kaj mondajn informojn. Por honoriĝi la memoron de 98-a naskiĝtago de L. L. Zamenhof estis aranĝita sabate la 14.12.1957 en salono de ŝtata muzikaltlernejo granda koncerto kun multnombra partopreno.

BŘECLAV: loko, kie antaŭmilite regis vigla E-vivo, nun registras nur du s-anoj kiuj anoncas novan laborperiodon. Almenaŭ tiel raportas fakinstruisto Ant. Vaja Ni vere antaŭĝojas!

BUDIŠOV NAD BUDIŠOVKOU: en okjara lernejo kurso gvidata de s-anino Marie Prašivková.

FRÝDEK-MÍSTEK: tre vigle laboras kun sia rondeto s-anino Marie Bartovská. Elstara entrepreno estis la 20.11.1957 aranĝita Solena vespero de Komenius, dum kiu koncertis ankaŭ Dro Pravoslav Sádlo-Páv el Praha.

FRÝDLANT n. O.: nove fondita klubo fare de s-ano Čestmír Závodný, kiu ankaŭ instruas en bone prosperita kurso kun 25 partoprenantoj.

HAVÍŘOV: la internacian gimnastikan konkurson por infanoj 1957 partoprenis 6 lernejoj (2 Anglujo, 2 Germanujo, 2 Ĉeĥoslovakujo). Venkis inter opuloj kaj ankaŭ grupe Anglujo. Gvidis s-ano Oldřich Schwetter. En lernejo por ministoj kurso gvidata de s-ano Jos. Šlachta.

HORAŽŤOVICE: loka rondeto ĉe OB vigle komencis la antaŭvintrajn laborojn. Post du prelegoj de Josef Vítek (en Rábí kaj Horažďovice) estas en fluo kurso de s-ano František Mudra, loka gvidanto. La rondeto laŭbezone eldonas propran cirkuleron, multobligas kantojn kaj instrucelajn tekstojn.

HRADEC KRÁLOVÉ: la bone preparita grandstila ekspozicio, kiu altiris atenton de sufiĉe multaj interesuloj, estis bona paŝo por kursoj, kiuj komencis. Regiona radiostacio de ĉiu merkredo (je la 18,30 h) alportas raportojn pri laboro de esperantisto jen la urbo kaj regiono. En la kultur-politika kalendaro regulo aperas presitaj sciigoj de la rondeto, kiu nove enkadriĝis en OB.

CHRUDIM: La 1-a de oktobro kurs opor komencantoj per afiŝoj publike anoncita. Helpe de s-anino Květa Čapská oni intencas plivigli la movadon.

JAKARTOVICE: en okjara lernejo la kurson gvidas fervora lernejdirektoro s-ano Hadámek.

JIHLAVA: unusemajnan ekspozicion en septembro vizitis pli ol 5000 (!) gastoj. Kursoj kun entute 87 interesuloj en fluo. Prelegoj de Josef Vítek aranĝataj la 17-an de januaro kaj la 14-an de februaro.

KAŠPERSKÉ HORY: multobligitan folion pri la historio de tiu urbo kaj de la regiono eldonis s-ano Emil Kotrba. Li propagandas Esperanton per elmontra fenestro kaj murkesto. Li administras la moderne ekipitan urban muzeon.

KRALUPY n. Vlt.: ĉe Esp. rondeto en Domo de kulturo nova kurso por 12 gekomencantoj. Instruas s-ano Jar. Masník.

LIBEREC: viglaj kunvenoj kun programoj ĉiumerkrede de la 20-a horo en ĉambro 17 de domo Lidové sady.

LITVÍNŮV: grupo kunvenadas ĉiumerkrede je la 19-a horo en la uzinklubo de Stalinovy závody en Litvínov-Střelnice. La sekretario de la uzinklubo k-do Vít favoras kaj subtenas la grupon. Li aĉetis bezonan instrumaterialon por propagando de la grupaj celoj li uzas fabrikan radion kaj gazeton. Ek de oktobro nova kurso, kiun gvidas s-ano Jan Uhlík el Rudolice.

Praha-ek-1958-50-19

BULTENO PRAHA 50-1958

- 19 -

MOST: la 7-an de decembro nikolaa dancvespero estiĝis rendezuo de pli ol 50 geesperantistoj el Most kaj proksima ĉirkaŭaĵo. Bona aranĝo, bona humoro, ĉiu ricevis sian donacon. La 8-an de decembro antaŭtagmeze laborkunsido de esperantistoj, kiun partoprenis ankaŭ la eksprezidanto de TKKE. Dum la raportoj estis substrekita longjara sukcesa laboro de meritplena s-ano Jan Uhlík. Du kursoj en fluo. La saman posttagmezon prelego de Josef Vítek en Rudolice.

NOVÉ ZÁMKY: la 6-an de novembro festkunveno okaze de la 40-jara datreveno de Granda Oktobra Revolucio en distrikta kleriga domo. En hungarlingva dekunujara lernejo rondeto kun 30 gestudentoj vigle studas kaj korespondas sub gvido de prof. Ernesto Geleta. Kunvenoj de lokaj esperantistoj ĉiuŝaŭde je la 18-a horo en la distrikta kleriga domo apud la ĉefa poŝto en Björneonova ul. La biblioteko nun havas 220 volumojn en Esperanto.

NOVÝ SMOKOVEC: en la tagoj 21.-26.10.1957 aranĝita kurso por esperantistajgekorespondantoj, kiun ĉiutage postsekvis interesaj diskuttemoj.

OSTRAVA: esperantistoj ĉe la Uzinkubo de ferfabriko de Klement Gottwald aranĝis en la tagoj 25.-30.10. seminarion pri diversaj popularaj priesperantaj temoj. Prelegis Inĝ. Jan Werner, Drah.Kočvara, Vladimír Slaný kaj Lad.Adámek. La 18-an de sept. Komencitaj 4 kursoj (du por komencantoj, unu por progresintoj, unu konversacia) – instruistoj Vlad.Slaný, Drah. kaj Vlast.Kočvara kaj Inĝ.Werner. Klubo de tramistoj aranĝis la 9-an de septembro bonsukcesan kvaronjaran kunvenon kun bazaro de esperantaĵoj. La 16-an de sept. komencis kurso por komencantoj (s-ano M. Maštálěř) kaj por progresintoj (s-ano V.Slaný).

OSTRAVA-HRABŮVKA: en metilernejo de VŽKG la kurson gvidas s-ano D.Kočvara.

OSTRAVA-HULVÁKY: 40 jarojn de Granda Oktobra Revolucio festita de loka klubo per estrado. La 20-an de septembro komencis instrui novajn kursanojn s-ano Vlad.Slaný. Kunvenoj vendrede je la 19-a h. en KD.

OSTRAVA-KUNČICE: en loka stacidomo preparas fondon de Esp. rondeto s-ano Fr. Strumínský.

OSTRAVA-VÍTKOVICE: en du okjaraj lernejoj infankursojn gvidas s-ano V.Slaný.

OSTRAVA-ZÁBŘEH: en okjara lernejo instruas Esp. al 18 infanoj V.Slaný.

OSTRAVA – aldonaj sciigoj: INTERBABILADO – la 26.-28.10. partoprenis krom ostravanoj preskaŭ 100 ges-anoj. Programo labora. Gravaj decidoj pri E-kursoj en lernejoj, pri kursoj kaj ekzamena komisiono, kulturkonkursoj ktp. – Junularo VŽKG krom kutimaj merkredaj kunvenoj aranĝas specialajn monat-programojn por pli vasta esperantistaro. E-libroj aĉetataj pere de speciala biblioteka fondue de la Uzina Klubo.

PARDUBICE: rondeto ĉe OB vigle laboras. Tradukita estis la koncerna artikolo pri Esperanto el leningrada „Bloknot agitatora ĉ. 1.“ La tradukon akompanas fotografajoj de la bloknoto. Interesuloj povas la laboraĵon ricevi por 1 Kčs ĉe s-ano Jaromír Štechr, Pardubice-Dukla, Moskevská 2275.

PASEKA u Šternberka: s-ano Boh. Horák anoncas fondon de nova rondeto kun 20 ges-anoj, kiuj perfektigaŭ laŭ la lernolibro de T. Kilian. Kunvenoj dufoje semajne en la sanatorio.

PLZEŇ: sian postlibertempan agadon komencis la grupo la 3-an de septembro per membra kunveno, kiun ĉeestis 17 ges-anoj kaj unu gasto el Bratislava. Kunveno okazi sen loĝejo de ges-anoj Kulíšek. La grupo preparis kursojn por komencantoj, progresintoj kaj konversacian.

PODĚBRADY: 7-an de oktobro en distrikta domo de kulturo kurso por 12 komencantoj gvidas s-ano Josef Chvosta. En dekunujara lernejo kurson por 14 gejunuloj gvidas s-anino Hana Sekotová. Daŭrigan kurson gvidas s-ano Frant.Pytloun. Regule ĉiumonate aranĝataj prelegoj de Josef Vítek. Festeno okaze de la 40-jara jubileo de G. O. R. aranĝita la 31-an de oktobro 1957. Salutleteroj forsenditaj al diversaj sovetaĵaj adresoj.

POHORELÁ: laŭ la informo de s-ano Andrej Baran el Švábovka estis fondita nova rondeto ĉe Uzinklubo Tatrasmalt en Pohorelá.

PORUBA ĉe Ostrava: Klubo ĉe Bytostav malfermis novajn kursojn la 24.9.1957. Instruas s-anoj Vlad.Slaný, Lad. Adámek kaj Arnošt Hojdýs.

PRAHA: en okjara lernejo en Vltavská ul. (Smíchov) fondita esp.rondeto, kiun partoprenas 31 gelernantoj. Dum la jarkunveno de la gepatroj en septembro, kiun partoprenis pli ol 350 gepatroj, la rondeto estis denove propagandista. Gvidas s-anino Škodová.

PROSTŘEDNÍ BLUDOVICE: kurson por 20 infanoj gvidas s-ano Oldřich Schwetter en okjara lernejo. La rondeto partoprenis per propra stando ekspozicion de pioniraj interesrondetoj en Český Těšín. Kaŭze de tio loka muzeo postulis materialon por daŭra elmonro. Dum distrikta konferenco de „Pionýr“ estis plej aplaŭdata la raporto pri agado de pioniroj esperantisto jen Bludovice.

PŘEROV: klubo aranĝis la 7-an de decembro sukcesan Nikolaj vesperon. La rondeto ĉe uzina klubo Přerovské strojírny same bone aktivis. Ĝia lasta ago estis porpaca manifesto, kiu estis alvoke dissendita en tutmondon.

PŘÍBOR: ekspozicio de esperantaĵoj aranĝita kun la ekspozicioj pri numismatiko kaj filatelio dum majo 1957 daŭris tri semajnojn kaj altiris atenton de vasta publiko kaj de kelkcentoj de mezlernejaj gelernantoj. En oktobro fondiĝis nova rondeto ĉe okjara mezlernejo, kie la instruisto A. Satték gvidas kurson. Lokaj esperantistoj kunvenas ĉiuvendre je la 19-a horo en bela ejo de uzina klubo Tatra en kultura domo en Příbor.

SADSKÁ: 30-an de septembro 1957 komencita kurs opor metilernantoj, kiun partoprenas 8 lernantoj kaj gvidas s-ano Josef Chvosta.

STARÝ SMOKOVEC: la 27.10. kunveno de slovakaj kaj moraviaj geesperantistoj, kiun ĝoje partoprenis ankaŭ polaj samideanoj-gastoj.

STRAKONICE: la prelego de Josef Víték komencis kurso kun ĉirkaŭ 30 adeptoj. Loka rondeto vigle kunvenadas. Meze de decembro ĝi adiaŭis s-aninon Marie Králová-Holmquist, kiu kun sia patrino elmigris Svedujon. Kurson kaj grupon ofereme gvidas s-ano Jan Blažek.

TÁBOR: en kadro de OB startis 31.10. kurso por progresintoj/ĉiujauĉe je la 19-a horo en 1a etaĝo de dua okjara lernejo „Na Parkánech“. En la sama ejo komencis la 13.11. kurso por komencantoj.

TŘINEC: sub gvido de fervora s-anino A. Milatová la rondeto ĉiam viglas. Por mezo de marto estas preparata prelegserio de Josef Víték.

VELKÝ OSEK: La 5.11. komencis kurson por 12 gekomencantoj s-ano F. Pytloun.

VRATIMOV: en kominka metilernejo 23 lernantojn, slovakajn instruas prof. Bas.

VSETÍN: la 19.-23.9.1957 seminario kun laborkunveno de regionoj Ostrava-Olomouc-Gottwaldov. Partoprenis 115 ĉeestantoj. Reprezentitaj esti ankaŭ la regionoj Bratislava, Žilina, Brno, Hradec Králové, Praha kaj Karlovy Vary. Tre sukcesa entrepreno, kiun krom aliaj valoraj kultureroj riĉigis la famkonata folkloro kolektivo Vsacan. Verkita rezolucio pri E-movado en ĈSR kaj salutletero al Sovetunio okaze de la datreveno de la Revolucio. Prelegis elstaraj ĉs. esperantistoj. La seminario estis longe preparata kaj modelo aranĝita. Ne mire ke tuj sekvis nova trimonata kurso por komencantoj (16 p.). Dankon ĉefe meritas la senlaca s-ano Aleš Berka.

ŽILINA: la 29.9.1957 post longaj jaroj aranĝita regiona konferenco, kiu signifas novan gravan paŝon antaŭen en la movado Slovana. Partoprenis 44 ĉeestantoj. Nivele modela. Akceptita rezolucio substrekas gravan taskon de Esperanto por la mondpaco, por kontraŭbatalo de uzado de atombomboj kaj montras bezono de subteno, kiel estas en ceteraj popoldemokratioj. – Letervesperon aranĝas la klubo la 1-an de februaro 1958. Skribu al la prezidanto s-ano Miro Závodský, Závodie 197, Žilina, ĈSR.

NI PUBLIKIGAS NUR LA RAPORTOJN, KIUJN NI SKRIBE RICEVIS, ĈAR EN MULTAJ PLURAJ LOKOJ LA MOVADO NE NU EKZISTAS, SED BONE PROSPERAS, NI PETAS RAPORTI EN KONCIZA STILO REKTE AL JOSEF VÍTEK, ul. ĉs. armády 54, MĚLNÍK.

DONACOJ: N. Šiková, Praha – 2; Ž. Jankůvová, Bardejov – 15; E. Rašková – 3; L. Prachár, Žarnovica – 3; R. Janečka, Lipová – 20; Dro Z. Duchoň, Strážnice – 15; B. Dryák, Praha – 10; L. Plavec, Hříměždice – 12; J. Hradecký, Rovensko – 10; A. Rakovských Canada – 50; J. Ptok, Mirošovice – 7; A. Vája, Břeclav – 4; A. Berka, Vsetín – 10; J. Bečka, Říčany – 3,50; J. Čáp, Staré Sedliště – 26; Bl. Štefek, Mostek – 20; P. E. Sedlák, Perin – 4,50; B. Vlčková, Teplice – 17,50; K. Štěpánek, Dolní Čermná – 10; Vl. Třeška, Prah – 10; J. Vrkoslav, Praha – 6; R. Michna, Lichkov – 20.

Al ĉiuj subtenantoj sinceran kaj koran dankon!

ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ bv. uzi la almetitan poŝtpagilon por renovigi la klubmembrecon por la jaro 1958. Membro Kĉs 24; soldato, ne perlaboranta junularo Kĉs 10; familia membro Kĉs 8.

Koran dankon pro via kompreno!

KORESPONDI DEZIRAS...

(por ŝpari lokon ni uzas la ĝenerale konatajn mallongigojn. Enpresitaj estas adresoj nur de tiuj interesuloj, kiuj rekte esprimis sian tiucelan deziron! Ilia morala devo estas almenaŭ unufoje respondi la koncernan proponon!)

BRAZILLO:

s-ano F. MIGUENS, rua Lucio Tavares 254, NIKOPOLIS, St. Rio de Janeiro, serĉas gekorespondantojn por siaj kurslernantoj

BULGARIO:

s-ano GEORGI MINDIZOV, str. Ep. Sofroni 9, VIDIN; dez.koresp.kun ĵurna kaj filat. pri ĵurnalismo, filatelo, foton., PM, PK, fotojn.

s-ano VASIL IVANOV ŜTERKOV, RAJKOVO Smoljansko; pri ĉ.temoj, PM kun kulturaj datrevenoj.

s-ano NIKOLAJ IVANOV, str. „Skopie“ 5 SLIVEN, Bulgario; pri ĉ. temoj, 18-jara studento.

ĈEĤOSLOVAKIO:

mi serĉas amikon en Praha, kun kiu mi povus konversacii en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. Proponu al 22-jara studento KAREL HORÁK, Praha 7, U Kapličku 32.

s-anino MARIE KALABROVÁ, Krále Jiřího 17, CHEB; Pl. L, kĉl.

s-ano KAREL JEŽEK, NOVÉ HAMRY u Karlových Var; pro ĉ.temoj kĉl. speciale kun Francujo kaj Anglujo.

HUNGARUJO:

s-ano EMERIK FARKAS, BUDAPEST I Gélérthey u. 14.III.1; pri ĉ.temoj, speciale pri kanalaraj fakdemandoj kĉl.

JAPANUJO:

s-ano MOSITA MASONUBU, 2933, Sunago-ĉo 2, Suita-ŝi OSAKA-hu; universitata asistanto pri fiziko kĉl.

NEDERLANDO:

s-ano W. SPOELDER, Egidiusstr. 42/I, AMSTERDAM-W; pri manballudo kĉl.

POLUJO:

s-ano STRAWIŃSKI BRONISLAV, ul. Jedności Robotniczej 219/1, GDANSK 9; 17-jara marmezlernejstudanto kun samaĝuloj/inoj/ĉefe el ĈSR pri ĉ.temoj.

geedzoj BARABARSKI JERZY, BYDGOSZCZ. Osiedle Lesne Topolowa 42 a m44, pri ĉ.temoj, speciale pri muziko kĉl.

s-ano MICHAL KUNA, MYSZKOWICZ, 12.p-ta Sączów pov. Bodzin; pri ĉ. temoj speciale kun ĈSR. Estas 18jara studento de mekanika fakultato.

s-ano JANUSZ ZADECKI, ul. P. Skargi 2/ KATOWICE; pri lit.sporto, politiko, Pl, PM, kĉl.

s-anino MARTA RUDNIAK, ul. Konopnickiej 16/3 STPSK; 18-jara studentino Pl, revuojn kĉl.

s-ano Mgr GRALIKOWSKI Mieczysław, ul. Dojazdowa 5 m. 7 KRAKÓW; 29jara ĥemiisto, filatelisto: nestampitaj aerpoŝtaj PM, sportaj kaj bestaj motivoj, tutajn seriojn, ĥemio, revuoj (esp., angl., germ., rus.), ĵazmuziko, pupoj, regionaj memorobjektoj.

s-ano JÓZEF KUBECKI, ZIELONA GÓRA, ul. Pastusza 8 m 2; PM kĉl.

s-ano KAZIMIERZ MAKOWSKI, P. L. O. DELPIN, pas. Tezoro n. W. voj. Gdańsk; 16jara licea studento PM, Pl, kĉl.

RUMANUJO: s-ano MIRCEA GEHANGHIR, str. Joachim Ghoerghe 33 R. Lenin, BUCURESTI; Pl bfl. Kĉl.

s-ano PR. IVAN P. KELEŜ, KISKANI-BRAILA; serĉas gekoresp. por la grupo kĉl. pri kulturaj, homaj, sciencaj aferoj, Pl.

SOVETUNIO: s-anino NEMĈIKOVA V. P. 4-a Ŝernomuŝkinskaja 11/11 loĝ 58 MOSKVA; 20jara oficistino pri ĉ. temoj kĉl. Pl.

s-ano LEDER LASTOĈKIN, Krasnoarmejskaja 19-45 KUJBIŜEV; PM, gaz. PK, lingvoj, literaturo, arto kĉl.

s-ano A. P. TOMILOV, Montiro aviagorodok d. 3 ĉ. 14 BAKU 33; PK, pri div. temoj kĉl.
s-ano G. A. GROSH, Pumpuri, Slokas 83, RIGA, Latvia SSR; kun gejun. ĈSR.
s-ano EŬGENO NIKITIN, ul. Puŝkin 15, KIŜINEV; art. kolor. PI kĉl.
s-anino PUTSEPP ILME, U. TALLINN, str. Nõmmo 34-1, Estona SSR, kĉl.
s-ano S. N. SADOVOJ, ul. Bogd. Chmelnickogo 45 kv. 2 ASTRACHAN; PI, L, kĉl.
s-ano V. SULIMENKO, str. Franze 18 k. 5. SUMI/Ukraino; PM.
s-ano VLADIMIR USAĈEV, Donskoj Perenlok 5 FRUNZE 2; 47 jara inĝeniero pri ĉ. temoj kĉl.
s-ano J. ABELE, Udens str. n. 7 lĝ 1 RIGA 2 LATVIA SSR; PM kĉl

Praha-ek-1958-50-22

BULTENO PRAHA 50-1958

- 22 -

s-ano LEDER LASTOĈKIN, Krasnoarmejskaja 19-45 KUJBIŜEV; PM, gaz. PK, lingvoj, literaturo, arto kĉl.
s-ano A. P. TOMILOV, Montiro aviagorodok d. 3 ĉ. 14 BAKU 33; PK, pri div. temoj kĉl.
s-ano G. A. GROSH, Pumpuri, Slokas 83, RIGA, Latvia SSR; kun gejun. ĈSR.
s-ano EŬGENO NIKITIN, ul. Puŝkin 15, KIŜINEV; art. kolor. PI kĉl.
s-anino PUTSEPP ILME, U. TALLINN, str. Nõmmo 34-1, Estona SSR, kĉl.
s-ano S. N. SADOVOJ, ul. Bogd. Chmelnickogo 45 kv. 2 ASTRACHAN; PI, L, kĉl.
s-ano V. SULIMENKO, str. Franze 18 k. 5. SUMI/Ukraino; PM.
s-ano VLADIMIR USAĈEV, Donskoj Perenlok 5 FRUNZE 2; 47 jara inĝeniero pri ĉ. temoj kĉl.
s-ano J. ABELE, Udens str. n. 7 lĝ 1 RIGA 2 LATVIA SSR; PM kĉl.
s-ano VLASILIEV Alexandr Miĥajloviĉ, Sukerfabriko NOVO-TAVOLĴANKA, Ŝebokinskij rajon, Belgorodskaja Oblast; PI, L, ĵurnaloj, ekspozicia materialo.
s-anino ALISE MORBERG, Dreilinu iela 9-1 RIGA 2 Latvia SSR; 30jara ekonomia inĝ. pri muziko, literaturo, natubelecoj, fremdaj lingvoj.
s-ano RAIMUND HAABVERE, N. Tāhe 18a 2 TARTU, Estonia SSR; pri literaturo, geografio, sporto, kulturo, historio kĉl
s-ano BORIS A. LOKTEV, 3-Soveta strato 16, lĝ. 4 LENINGRAD S-36; 18jara kun junularo ĉl.
s-ano ALEKSEJ TOLOKONCEV, ul. Presvesĉenija I-94, KOSTROMA 4; rondeto de 27 junaj geesperantistoj serĉas gekorespondantojn kĉl.
VIETNAMIO:
s-ano DINH THUAN MY, B. P. 482, PHNOMPENH, Cambodge; por tuta grupo de lernantoj – pri ĉiuj temoj, PI, PM, fotojn ktp. kĉl.

ATENTU NOVAN ADRESON DE LA REDAKCIO:
BULTENO, ul. ĉs. armády 54, MĚLNÍK, Ĉeĥoslovakio

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo ĉe OB2 en Praha
Aperas laŭbezzone.

Pri la enhavo respondas: Josef Vítek, ul. ĉs. armády 54, Mělník.
Prezidanto de la Klubo: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha 1, tel. 63 464.